

*La „malfrmita letero” de la prezidanto de PEA s-ro Stanisław Mandrak, sendita al aktiviloj de pola E-movado elektronike, publikigita ankaŭ de kol. Marian Zdankowski en la 7. numero de lia elektronika gazeto (kun mia respondo, publikigita sen mia permeso).*

## **Stanisław Mandrak**

### **Ĉu sufiĉas nur vortoj?**

Proksimiĝas la elektotempo en la strukturoj de la Ĉefa Estraro de PEA. Elektaj okazos meze de septembro. Tre gravaj elektaj, ĉar elektota nova estraro devos „travivi” la preparojn kaj laboron pri kaj dum UK 2009.

Mi pensas, ke estas jam „la lasta momento” por redaktoro de „PE” informi siajn legantojn, precipe polojn, pri tiu grava evento en pola Esperantujo, balotoj en PEA, ligitaj forte kun atendata nin post 24 monatoj UK. Restis nur 24 monatoj.

Sed ĉefredaktoro anstataŭ „batali” en sia (nia) revuo por pli bona pola E-movado subtenante PEA-n, sugestas, ke PEA kulpas pro la fino de aperado de „Pola Esperantisto” ĉar PEA ne volas daŭrigi la kontrakton kun s-ro Leja. Kun la lasta numero de „PE” estis dissendita enketo kun propono la novan nomon por la nova revuo. Multe da homoj reagis kaj demandis kial la Ĉefa Estraro de PEA bremsas la eldonadon de „PE”. Vere estas tute alia. Fakte kontrakto inter PEA kaj eldonejo „Hejme” estis subskribita ĝis la fino de tiu jaro, sed ne estas problemo subskribi (daŭrigi) la kontrakton. Sed ĉefredaktoro ne kontaktiĝis kun la Ĉefa Estraro. Daŭrigi la kontrakton povas aŭ „malnova estraro” aŭ novelektota en septembro. Ankoraŭ estas tempo por daŭrigi la kontrakton. Estraroj devus scii ĉu estas volo flanke de

redaktoro daŭrigi la pluan eldonadon de „PE”. Sugesti al legantoj ke kulpas tiun problemon la Ĉefa Estraro de PEA, ...kiu prokrastas la elektojn de la nova Ĉefa Estraro de PEA... (PE nro 3/2007 p. 2) estas laŭ mi, delikate dirante, ne elegante. Mi ne komprenas rilatojn inter elektoj kaj eldonado de „PE”. Ĉu s-ro Leja volas rezigni el eldonado de revuo, sed ne scias kiel fari tion elegante? Same koncernas al rezignado de ĉefa redaktoro pri plua aparteno al PEA. Mi rememoras, ke aparteno al PEA ne estas deviga.

Ĉiu esperantisto povas en ajna momento aliĝi al PEA kaj rezigni.

Post la diskuto pri estonteco de E-movado en Pollando dum pasintjara „Arkonnes”, en kiu oni tre akre atakis PEA-n kaj proponis fondi la novan E-organizon en Pollando, neniu el grupo de atakintoj akceptis la proponon de gvidanto (s-ro Bobrzak) prepari tiun fond-kunvenon.

Mi proponis la liston de grupoj, filioj, E-organizoj kun kiuj oni devus kontaktiĝi kaj inviti al tiu fond-kunvevo, sed neniu volis okupiĝi pri tio. Neniu ankaŭ volis prilabori la novan statuton por la nova organizo. Post tiu diskuto redaktoro skribis: ... Oni povas nur bedaŭri, ke ne sufiĉas por kelkaj aktivuloj kuraĝo eldiri publike tion kion ili parolas kaŝe... (PE 6/2006 p. 3). Mi ankaŭ bedaŭras pro tio.

Eble ni ne diskutu ĉu fondi novan

E-organizon, ĉar organizaĵoj kiuj funkcias en Pollando bezonas la helpon. Nian helpon. Ne sufiĉas nur kritikado, sed agado per sugestoj, proponoj, raciaj pripensoj, promocioj de lingvo ktp. Por tio estas bezonata vera tutpollanda E-revuo.

Restis ankoraŭ kelkaj semajnoj ĝis la elekto de la nova Estraro. Pripensu en Viaj kluboj, grupoj, rondoj, ĉu ĉirkaŭ Vi ne estas personoj, kiuj volus kaj povus helpi al POLA ESPERANTUJO.

Homoj ofte „hontas” prezentiĝi publike, dirante ke ili ne scipovas agadi, ke aliaj faros tion pli bone ktp. Multe el ili scipovas, sed oni devos „malkovri” ilin, subteni, konvinkigi al agado.

Multe el Vi povus helpi en tiu laboro. Ĉu Vi ne estus pretaj kunlabori kaj helpi al nova Estraro de PEA? Ne forgesu, ke ĉijare ni festas la 120<sup>an</sup> datrevenon de la apero de la unua E-libro kaj la 90<sup>an</sup> datrevenon de la morto de Ludoviko L. Zamenhof. Post du jaroj ni gastos en nia lando esperantistojn el la tuta mondo, kiuj venos por festi komune 150<sup>an</sup> datrevenon de la naskiĝo de nia Majstro. Pola Esperantujo bezonas ankaŭ Vian helpon ankaŭ Viajn manojn.

Stanisław Mandrak  
prezidanto de Pola Esperanto-Asocio

## Ne sufiĉas nur vortoj...

Legantoj de *Pola Esperantisto* (PE) onidire ne ŝatas personajn akuzojn en nia Movado. Malgraŭ tio, la „malfermita leteroj” de Stanisław Mandrak sendita ankaŭ al la redakcio devas esti publikigita.

Interese, ke la aŭtoro tiom da spaco dediĉis al PE kaj al mi persone, supozigante la legantojn, ke la revuo kaj mi malhelpas PEA-n en ĝia agado. Ne restis spaco por skribi pri konkretaj proponoj, taskoj kaj celoj, kiujn devas plenumi elektota nova (mi dubas!) Ĉefa Estraro de PEA. Nur mencio pri grava okazontaĵo — la UK ‘2009 en Pollando kaj lastmomenta serĉado (ĉu vere?) de eventualaj anstataŭontoj...

Kaj tre miriga, tamen ekspektata eldiro pri la Arkonesa elpaŝo de Tomasz Chmielik: nur kritikado kaj malhelpo! Mi citu: *Ne sufiĉas nur kritikado, sed agado per sugestoj, proponoj, raciaj pripensoj, promocioj de lingvo ktp. Por tio estas bezonata vera tutpollanda E-revuo.* Jen denova aludo al PE: **vera** tutpollanda E-revuo estas bezonata! Ja PE tia ne estas, ĉar estas sendependa de s-roj Mandrak kaj Zdechlik kaj prezentas i.a. aktualan (= magran) staton de pola Esperantujo, ne tuŝitan dum ilia gvidado. Mi suspektas, ke s-ro Mandrak havas do novajn planojn...

Mia laboro atestas pri mi. Ankaŭ la vortoj. Neniam mi skribe aŭ parole eldiris malveron, pri kio nun mi estas akuzata (ankaŭ en privata korespondo kun Stanisław Mandrak, kiu — koleriĝante, ke mi ne volas malsekretigi nomojn de miaj informantoj, skribis: „papero estas eltenema, ĉion akceptos”). Oni povas nur bedaŭri, ke s-ro Mandrak ne volas

(ne scipovas?) estimi homojn, kiuj vere ion ajn faras por la Esperanto-movado, ankaŭ siajn estraranojn, kiuj timas publike kontraŭstari lin, sed malhonori ilin kaj eĉ insulti per vulgarej vortoj, jes. Aldone, kio denove okazis, li tre volonte manipulas vortojn kaj eldirojn, supozigante, ke ĉiuj „malbonaj samideanoj”, anstataŭ labori, batalas kontraŭ li. Kaj denove nur li povas savi la Movadon. Sen komento...

Antaŭ 6 jaroj, interkonsentite kun la ĈE de PEA, mi komencis redakti kaj eldonadi la revuon *Pola Esperantisto*, laŭ kriterioj pli frue preparolitaj. Ili i.a. estis: 1) PE ne estu movada „bulteno” kaj „organo” de PEA; 2) ĝi celu kunligi — kiel tutlanda revuo — disĵetitajn esperantistojn, apartenantajn al diversaj E-organizaĵoj aŭ apartenantajn al neniu el ili. Se la unua kriterio estis facile plenumbla, la dua restis ĝis nun revo, malgraŭ diversaj provoj aktivigi kunlaborantojn. Eĉ la proponoj pri memredaktataj „propraj” paĝoj, adresitaj i.a. al PEJ kaj Silezia E-Asocio ne trovis sian realigon pro simpla... malintereso de koncernaj adresatoj.

Multaj penoj por akiri pli da kunlaborantoj kaj abonantoj estas de difinita tempo (de ĉirkaŭ 2004 jaro) malhelpataj per malfavoraj eldiroj kaj atakoj kontraŭ PE kaj mi mem fare de du ĉeffunkciuloj de PEA. Mi disponas pri registritaj, publikaj eldiroj de s-ro Zdechlik (ĝenerala sekretario kaj la kasisto de PEA) kaj informoj de personoj, kiuj informiĝante pri la ebleco aboni PE, de la sama persono ricevis respondon, ke PE ne plu aperas. Dum diversaj okazoj ankaŭ s-ro Mandrak permesis al si ne nur malfavore, sed simple vulgare kaj insulte rilatiĝi al konataj personoj de la E-movado, kunlaborantaj kun PE. Ĉio ĉi sukcese malgrandigis abo-

nantaron de PE, kiu multfoje ĝis difinita tempo estis informata, ke PE estas la organo de PEA. Aktivuloj de la Movado estis ankaŭ informataj, ke PE ne akceptas primovadajn tekstojn kaj ne volas publikigi movadajn informojn. Miaflankaj ĝustigoj restis sen eĥo.

Plej ruza, tamen, estas hodiaŭa alvoko de la prezidanto, kiu proponante agadon anstataŭ vortoj, difinas tiun agadon: „... per sugestoj, proponoj, raciaj pripensoj, promocioj de lingvo ktp”. Ĉu *Pola Esperantisto* ĝuste ne tion faras de 5 jaroj? Ĉu ne promocias kulturon, literaturon, la lingvon — kio laŭstatute estas la devo de PEA? Ĉu la propono de Tomasz Chmielik dum la fama ARKONES, okazigi tutlandan kongreson, kie oni povus diskuti pri veraj problemoj de pola Esperantujo ne estis konkreta propono por „la plej granda pola E-organizo”?

Malbona atmosfero kaŭzita de miaj akuzantoj venigis min antaŭ unu jaro al ideo lasi la decidon pri plua kontrakto ne al la nuna ĈE de PEA sed al la Landa Delegita Kunveno\*. Tio plu validas (**per tiuj ĉi vortoj mi prokrastas la decidon de neel-donado, publikigitan en la lasta n-ro de PE, pro ĵus ricevita informo, ke la Landa Delegita Kunveno okazos la 15<sup>an</sup> de septembro**).

Se kunvenontoj decidis pri plua kontrakto kun la Eldonejo HEJME, mi pretas kontinui mian laboron. Malgraŭ ĉio.

Kazimierz Leja

\*„La kuranta jaro estos ankaŭ la jaro decida pri plua sorto de Via revuo. Laŭ interkonsento inter la Eldonejo Hejme kaj PEA pri redaktado kaj eldonado de PE, tiu ĉi jaro estas la lasta, se ambaŭ flankoj ne decidis alie. Kun certa scivolemo mi atendas oficialan sciigon pri la termino kaj loko de la ĉi-jara Landa Kunveno de Delegitoj de PEA, **dum kiu la afero indas esti pritraktita**” (PE n-ro 25 – 1/2007).

## Izrael Lejzerowicz (1901 – 1944)

Izrael Lejzerowicz (konata ankaŭ kiel Georgo Verda kaj ILo) naskiĝis la 4<sup>an</sup> de junio 1901 en Lodzo<sup>1</sup>. Kiam li havis 11 aŭ 12 jarojn, li esperantistiĝis<sup>2</sup> kaj komencis aktivan agadon en la Movado. Tuj post la fino de la unua mondmilito li fondis Junularan Sekcion de Pola Esperantista Societo (PES), el kiu poste kreskis Pola Esperanto-Asocio (PEA). Li redaktis kaj eldonadis manskribitan hektografan bulteneton *Junula Voĉo*. Samtempe li organizis ankaŭ la filion de Laborista Esperantista Societo *Laboro*, ligita kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kaj dum jaroj li estis ĝia gvidanto. De 1924 li estis membro de Lingva Komitato. Li ne forgesis diskonigi Esperanton inter la polaj judoj. Li eldonis Esperantan ŝlosilon kaj lernolibron por judoj *Lernbuch fun der internationaler ŝprach* (Lodzo, 1926).

De 1921 li aktivis en la laboroj de Tutmonda Esperanto-Hebrea Asocio (TEHA). Li estis elektita kiel estrarano. En 1923, en Częstochowa, li organizis la konferencon de TEHA. Dum la 17<sup>a</sup> Universala Kongreso en Ĝenevo (1925), TEHA estis reorganizita kaj alprenis la novan nomon — Hebrea Esperanto-Asocio (HEA). Oni elektis Lejzerowiczon ĝia prezidanto, kaj la ĝisnuna prezidanto, Emanuel Olšvanger, konata esploranto de la juda folkloro, iĝis Honora Prezidanto de HEA.

Lejzerowicz aktivis en PEA kun intenco plifortigi ĝian agadon. Kun granda espero li akceptis la konferencon de reprezentantoj de Esperanto-asocioj

funkciantaj dise en Pollando. La konferenco okazis novembre 1926 kaj oni decidis fondi centran, neŭtralan Pollandan Esperanto-Delegitaron (PED). En la Delegitaro Lejzerowicz vidis la tegmenton, sub kiu povus kunlabori ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, sendepende de agadceloj kaj regiono. Celata estis kunlaboro por la bono de Esperanto, en konkordo kaj kun plena respekto al diverseco kaj aparteco, sed kun samtempa rezigno je propraj ambicioj, kriplaj imagoj, malutilaj klopodoj kaj senfruktaj disputoj. Pri tio Lejzerowicz skribis en sia artikolo *Rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante (Pola Esperantisto, 3/1927, p. 43)*. Okdek jarojn poste la Lejzerowiczaj pensoj aktualas por la nuna stato de PEA, kiu disfalas pro neagemo kaj malsanaj ambicioj de fuŝaj gvidantoj, rompantaj ĉian demokration kaj malestimantaj, eĉ kalumniantaj tiujn lastajn, aktivajn idealistojn, kiuj restis en la naskiĝlando de Esperanto. Estus do konsilinde tiri konkludojn el tiu severa leciono de Lejzerowicz.

Admirindas tiu organiza kapablo de Lejzerowicz — li gvidis aktivadon de kelkaj organizaĵoj samtempe. Grava estis sincereco, kiu manifestiĝis en liaj paroladoj kaj artikoloj, tuŝantaj la plej tikkajn, kaj iafoje dolorigajn, movadajn aferojn. Krom la sincereco liajn publikajn elpaŝojn distingas nekompromisemo kaj radikaleco. Kiel ĵurnalisto li kunlaboris kun *Esperanto Triumfonta* (poste *Heroldo de Esperanto*), *Pola Esperantisto*, *Literatura Mondo* kaj *Nia Gazeto*. En siaj

artikoloj el la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento li kritikis ĉefe la false komprenatan neŭtralismon, detruanta la moralan bazon por la disvastigo de Esperanto. Lige kun potenciĝanta faŝismo kaj blekantaj naciismoj Lejzerowicz konvinkas, ke oni kuraĝe montru la perdon de idealismo de la Movado. En la artikolo *Programoj kaj ideoj* (*Pola Esperantisto*, 2/1928, p. 4–5) li konstatas, ke ĝuste sen idealismo la Movado ne plu estos kapabla vivi kaj progresi, kaj en tiuj societoj, kie Esperanto estas traktata nur kiel lingvo, mankas veraj esperantistoj.

Liaj pensoj estas proksimaj al la pensoj de Leono kaj Lidja Zamenhofoj, kiuj ofte atentigis, ke nepras strebadoj, kiuj kondukos al tio, ke en la Movado regu la Interna Ideo.

Kiel ĝenerala sekretario de LKK Lejzerowicz aranĝis sukcese la 4<sup>an</sup> Tutpolan Esperanto-Kongreson en Lodzo (1930).

En 1930 oni enkondukis Esperanton en tri Lodzajn elementajn lernejojn kaj unu gimnazion, kaj ankaŭ en unu infanvartejon. Inter la instruistoj ne mankis Lejzerowicz.

Suferiga por li estis la tago de la 11<sup>a</sup> de majo 1933, kiam okazis publika bruligado de libroj de eminentaj germanaj verkistoj — iuj simpatiadis kun maldekstruloj, kaj aliaj estis „rase malpuraj”, kiel Heine kaj Lessing. Lejzerowicz reagis akre per sia artikolo *Sangaj ludoj* (*Literatura Mondo*, 1933, p. 76-77). Li vipas per amara kririko la „neŭtralecon” de la „verdstelanoj”: *La esperantistoj, sciantaj fanfaroni pri la Festo de la Libro, ne scias aŭ evitas sub mantelo de falsa kaj hontiga neŭtraleco funebri, kiam la Libro pereas en flamoj, ili ne scias eĉ krei, protesti, rigardante tiun barbaraĵon. La nespertita*

*doloro tremskuas min trae. La esperantista popolo havas sian Feston de la Libro. Ha-ha-ha!”*. Baldaŭ esperantistoj iros al la Jubilea 25<sup>a</sup> Universala Kongreso en Kolonjo. Laboroj de tiu kongreso okazis inter flagoj kun svastiko, en plena izolo for de la ekstera mondo. Post la kongreso Lejzerowicz skribis en la artikolo *Sobre kaj decide. Kongresano kiu [ne] kongresis* (*Pola Esperantisto*, 8–9/1933, p. 114–116), ke tiu aranĝo kaj la etoso ĉirkaŭ ĝi estis dolora ofendo al la idea esperantismo. En siaj artikoloj el tiu ĉi tempo Lejzerowicz memorigadis, ke L.L. Zamenhof mem protestis dum la Universala Kongreso en Ĝenevo (1906) kontraŭ la pogromo okazinta samjare en Bjalistoko kaj ĝenerale kontraŭ frakasado de homaj rajtoj pro la rasa aparteneco. Do, ekzistas nek baroj, nek obstakloj por ke la Esperanto-movado protestu kontraŭ ĉiuj formoj de maljusteco, persekutoj kaj subpremado, kiuj endanĝerigas la tutan homaron. Tian sintenon de Lejzerowicz oni povus nomi aktiva neŭtralismo, kiu devus ĉiel defendi la homan dignon kaj ĉial strebi al homa libereco.

El tio fontas la severa kritiko de Lejzerowicz, turnita kontraŭ la ĉefaj instancoj de la Movado, kiuj allasis al tio, ke la antaŭmilitaj UK-oj post Kolonjo fariĝis nur festoj kun distroj, ekskursoj kaj fotografado. Ekmankis tio, kio formis ilian esencon. Laŭ Lejzerowicz — la UK-oj devus esti la plej alta leĝdona institucio. Ŝajne li pravas, ĉar la UK-oj — tiu eksterordinara kaj unika kunveno de la tutmonda esperantistaro, okazanta ĉiujare en alia lando — servas ĉefe por amuzado kaj babilado, kaj ie perdiĝis ilia rolo por montri novajn vojojn, por krei modernajn agadosferojn al la tuta Movado.

Lejzerowicz estis aktiva membro de la Asocio de Judaj Verkistoj kaj Ĵurnalistoj en Varsovio, kaj ankaŭ de la Juda Filio de PEN-Klubo. Zusman Segalowicz (1884–1949) aperigis en 1939 sian verkon *Tłomackie 13 (Z unicestwionej przeszłości — Wspomnienia o Żydowskim Związku Literatów i Dziennikarzy w Polsce: 1919–1939)* (El la ekstermita pasinteco — Rememoroj pri Juda Asocio de Verkistoj kaj Ĵurnalistoj en Pollando: 1919–1939)<sup>3</sup>. Li priskribis historion de juda verkista kaj ĵurnalista medio, kies asocio troviĝis ĉe la strato Tłomackie 13. Kelkfoje aperas ĉi tie la nomo de Lejzerowicz. Ankaŭ de tempo al tempo al tiu literatura hejmo en Varsovio venadis gastoj de proksime kaj malproksime. *Iam vizitis nin japana verkisto. Li prelegis pri Japanujo en Esperanto.* Kompreneble Lejzerowicz estis tiu, kiu jidigis ĉi prelegon!

Lejzerowicz tradukis du konatajn verkojn el la juda literaturo: la dramon *Dibuk* de Ŝimon An-Ski (1863–1920) kaj la romanon *La sorĉistino el Kastilio* de Ŝalom Asch (Aŝ) (1880–1957).

En la dramo punita junulo, kiu ne trovis pacan ripozon post la morto, lokiĝis en la korpo de sia amata knabino. Li certas, ke li estas destinita al ŝi kaj ne volas ŝin forlasi. Tiel ekposedinte la knabinon kiel dibuko, li punas la malfeliĉan familion kaj deziras juston. La rabeno forpelas la dibukon el la korpo de la knabino, sed tuj poste ŝi mortas antaŭ la edziniĝo kun neamata junulo. Tiel ŝi povas spirite ekligi sin kun la mortinta amato. Lejzerowicz elektis ĉi verkon aparte pro ĝia morala enhavo, kaj recenzintoj alte taksis la tradukon.

La romano de Aŝ prezentas kruelecon de Sankta Inkvizicio kaj teruraĵojn, kiujn

devis suferigi la judoj en la dekkvinjarcenta Hispanio. La bulao de papo Inocento la 8<sup>a</sup> enkondukis la plej severajn rimedojn por ekstermi „sorĉistinojn” — demonposeditajn virinojn. „Sorĉistino” povis iĝi ĉiu virino — sufiĉis falsa akuzo. Milojn da „sorĉistinoj” oni forbruligis sur ŝtiparo aŭ dronigis en riveroj. Centmilojn da iliaj samgentanoj oni torturis kaj ankaŭ kondamnis al morto en flamoj. Nur malmultaj estis forpelitaj. En la fino de sia Antaŭparolo Lejzerowicz skribis: [La verko] estas vekkrio de generacioj kontraŭ la nepriskribebbla barbareco de „sankta” inkvizicio, kiu dum mezepoko neniiĝis centmilojn da homaj vivoj per neimageblaj torturoj kaj fajro sole pro tio, ke tiuj viktimoj havis aliajn konvinkojn. Ĝi estas signalo je aspiroj pli noblaj kaj rilatoj pli homecaj (p. 9).

El la germana li tradukis la novelon de Stefan Zweig *Amoko* el la kolekto *Amok. Novellen einer Leidenschaft* (1922). Ĝi aperis en 1935 ĉe Libro Kooperativo AELA (Aktivuloj de Esperantistaj Libro-Amikoj) de *Literatura Mondo*.

Pleje disfamigis Lejzerowiczon la originala Esperanto-libro *El la „Verda Biblio”* kaj *Babiladoj kun Horaĉo Serĉer* — ambaŭ eldonitaj de *Literatura Mondo* en 1935. Apartajn ĉapitrojn oni aperigis pli frue en la sama revuo. La satiraĵo dekomence fariĝis ŝatata por ĉiuj generacioj da esperantistoj. Ĝi pensigas kaj kortuŝas. Kun aparta ĉarmo kaj inventemo Lejzerowicz akordigis primokon de la „verda popolo” al la komencaj ĉapitroj de la Biblio. Sentiĝas amo por la afero kaj personoj, kiujn senindulge, tamen neniam malice vipas Lejzerowicz. Ravas lia spriteco en la trovo de bibliaj analogioj. En 1978 Hungara Esperanto-Aso-



cio reeldonis ĉi verkon, klarigajn notojn por la teksto, kaj mallongan biogramon de Lejzerowicz skribis Vilmos Benczik. En 1995 Jerzy Fornal sursceniĝis kelkajn ĉapitrojn, kaj la spektaklo *El la „Verda Biblio”* estis ofte prezentita en Pollando kaj eksterlande, ĉiam kun vigla akcepto de la spektantoj.

Persekutado kontraŭ esperantistoj en Germanio kaj Sovetio. Kreskanta antisemitismo en la katolika kaj dekstrula medioj en Pollando damaĝis la etoson de la Jubilea 29<sup>a</sup> Universala Kongreso en Varsovio, okazinta en 1937. Lejzerowicz kuraĝe skribis pri tio en sia artikolo *La Jubilea (Literatura Mondo, n-ro 4/1937, p. 97–100)*:

*Estus sence silenti pri aferoj, kiuj ne sole meritas nian kondamnon, sed postulas la komunan streĉon de ĉiuj fortoj fare de tiuj grupoj kaj anaroj, kiuj sentas en si ankoraŭ la homan dignon, konscias la danĝerojn, kiuj minacas la homaran kulturon flanke de la vandalismo, furiozanta nun tra la mondo kaj minacanta detruiri tion, kion la plej noblaj filoj de la homaro konstruadis pene dum jarcentoj. Kaj ĝuste ankaŭ kiel nuraj esperantistoj ni devas proklami batalon kontraŭ la hidro de tiu nigra mallumo kaj besta malamo. Niaj spertoj jam sufiĉe klare instruas nin, kiom multe tiu pesto minacas rekte nian movadon. Finfine ankaŭ nia movado posedas, devas posedi sian honoron, sian dignon. La Jubilea kongreso ne havis la kuraĝon diri, kion ĝi pensas pri la sennombraj venenmiksantoj, volantaj la mondon dronigi en maro da sango, kaj ĝi rifuzis la rezolucion de pluraj esperantistaj kulturhomoj, en kiu estis esprimita la plej energia protesto kontraŭ tiuj demonaj fortoj, kiuj en certaj landoj penas mortbati la Esperanto-movadon. Ĉu ni efektive devas kun rezigno engluti plej fiajn atakojn, mensogojn kaj blufojn, kiujn niaj malamikoj*

*senhonte disvastigas? Ĉu ni do ne kuraĝas defendi nian propran dignon? Ni scias, kion iuj praktikuloj volas diri al ni: ni devas esti singardaj, ni devas esti ruzaj diplomatoj, por ne ofendi iun ajn. Sed tio estas erara! Niajn malamikojn — vi konas ilin tre bone — ni ne mildigos per nia humileco. Inter ni kaj ili kuŝas abismo nepasebla: ni estas ja tio, kion ili pleje malamas — kultura, demokrata, pacifista movado! Se ni ne defendos nin kontraŭ ili, ili disfrakos nin, kiel tio jam en kelkaj landoj okazis!*

*Devas fine ĉesi la hipokrita kaŝado de niaj idealoj. Per tio ni ne nur ne pligrandigos nian anaron, sed — kontraŭe — dekonigos niajn vicojn, kiuj sen tio ne estas tro fortaj. Nun, en la jubilea jaro, estas necese admoni la esperantistaron: aktivigu! Alie minacas al ĝi ŝrumpiĝo kaj agonio neevitebla (p. 99).*

Inter la 18<sup>a</sup> kaj la 19<sup>a</sup> de junio 1938, en Krakovo okazis la 8<sup>a</sup> Pollanda Esperanto-Kongreso. Venis malmulte da partoprenantoj, sed multe da atakoj faris la naciisma gazetaro. Grupo de agantoj, inter kiuj troviĝis Lejzerowicz, instigis Pollandan Esperanto-Delegitaron (PED), ke ili alprenu la rezolucion, kiu decidis turni sin al tribunalo kontraŭ ĉiuj, kiuj atakos la Movadon senkaŭze. Lejzerowicz mem kun granda pesimismo vidis la estonton. Li tamen ne retiriĝis el agado kaj daŭrigis sian laboron por Esperanto en Lodzo ĝis la militeksplo.

Fine de septembro 1939, kiam la persekutado kontraŭ judoj estis pli kaj pli kruela, Lejzerowicz fuĝis de Lodzo al Varsovio. Akompanis lin edzino Regina, ankaŭ esperantistino, kaj la filineto. Dumvoje ili estis kaptitaj de germanaj soldatoj kaj senditaj en koncentrejon apud Krakovo. En la libro de Odo Bujwid, *Osmotnienie — Pamiętniki z lat 1932–1942* (Soleco — memorlibroj el la jaroj 1932–

1942) oni trovas notaĵon pri Lejzerowicz. Sub la dato de la 6<sup>a</sup> de oktobro 1939 (p. 167) li skribis: *Hieraŭ Zaŭski alportis folion de Lejzerowicz el firmao Beze kun peto pri ĉemizo kaj mono. Mi donis kaj scivolas, ĉu li ricevos tion?* Baldaŭ Lejzerowicz sukcesis forkuri kun la familianoj de tie al la Varsovia geto. En mizerego, kun teruraĵoj minacantaj sur ĉiu paŝo, Lejzerowicz pasigos tie preskaŭ du jarojn. Li ricevis laboron en germana fabriketo inter la geto–muroj.

Laŭ raporto de Isaj Dratwer li partoprenis kaŝajn renkontiĝojn de grupo de esperantistoj okaze de la Zamenhof–festoj kaj faris kortuŝajn paroladojn. Li interŝanĝis korespondaĵojn kun eksterlandaj samideanoj. Konservigis liaj poŝtkartoj senditaj al Hans Jakob en Ĝenevo. Lejzerowicz petis, ke li helpu trovi familianojn vivantajn en Usono kaj Sudameriko. Ili povus akirigi por li kaj liaj edzino kaj filineto savajn vizojn. Li ne forgesis ankaŭ Lidjan Zamenhof, por kiu li ankaŭ petis helpon. Tamen ĉiuj ĉi klopodoj estis vanaj. Li provis ankaŭ verki libron pri familio vivanta antaŭ la milito en Lodzo, kaj poste en la Varsovia geto. Li tradukis la historian poemegon en versoj *Konrad Walenrod* de Adam Mickiewicz. Bedaŭrinde ambaŭ manuskriptoj estas perditaj.

Por la lasta fojo Isaj Dratwer vidis lin somere de 1942. Baldaŭ komenciĝis la aŭtuna likvido–kampanjo. Supozeble tiam oni pelis Lejzerowiczon kun la edzino kaj filineto al *Umschlagplatz*. Iu vidis, ke germanoj disigis ilian triopon kaj enpuŝis ĉiun aparte en la vagonojn, kiuj fortransportis ilin kun centoj da judoj al la ekstermejo en Treblinko.

## Notoj


<sup>1</sup> En *Leksikono de nuntempa juda literaturo*, kiun prilaboris Haim Lejb Fuchs, oni trovas la indikon, ke Lejzerowicz naskiĝis en urbeto apud Lodzo, sed la nomo de tiu urbeto ne aperas tie. Laŭ iuj judaj fontoj li estis studento de Varsovia Universitato. Tamen estus vane serĉi lian nomon en la registrolibro de la Arkivo de Varsovia Universitato.

<sup>2</sup> El lia biografia artikolo *Mi estas Judo* (*Nia Gazeto*, 6/1934 — monatrevo aperanta de 1934 ĝis 1938, kun kiu kunlaboris esperantistoj el pluraj landoj, kaj ankaŭ la poloj: Lidja Zamenhof, prof. Odo Bujwid, Izrael Lejzerowicz kaj Franciszek A. Pregel).

<sup>3</sup> Tomasz Chmielik Esperantigis ĉi verkon en 2003.

Kompilis Tomasz CHMIELIK

Grandan dankon mi ŝuldas al Zofia Banet–Fornalowa, el kies eseo pri Izrael Lejzerowicz, aperinta en ŝia libro *La Pereintoj in Memoriam* (Eldonejo HEJME, Czeladź 2003) mi ĉerpis multajn faktojn por mia biogramo. La artikolojn, kiujn skribis I. Lejzerowicz, mi prezentas laŭ ŝia elekto. Mi samopinias kun ŝi, ke estus interese aperigi ĉi artikolojn kun klarigaj notoj (TCh).





## Julius Balbin (1917–2006)

La 14<sup>an</sup> de julio 2006 forpasis en Marche en Famenne (Belgio) konata Esperanta poeto, Julius Balbin. Kiel poligloto li tradukis poezion el 8 lingvoj kaj verkis signifajn eseojn rilatantajn esperantologion kaj pli vaste: lingvistikon, ankaŭ literaturon.

Li estis membro de la Akademio de Esperanto kaj dumviva membro de Universala Esperanto-Asocio, ankaŭ fakdelegito pri interlingvistiko kaj literaturo, kaj membro de fondita en 1987 jaro Esperantlingva Verkista Asocio. Li laboris kiel universitata profesoro, instruante kelkajn lingvojn ĝis sia emeritiĝo en la jaro 1988.

Julius Balbin naskiĝis en Krakovo en 1917, en bonstata familio. La patro estis dentisto, relative principa en edukado de infanoj, t.e. de li kaj de lia fratino; sed lia patrino, familie Löwy, per sia varmkoreco grave influis familian etoson. Julius amegis la patrinon kaj karakterizis sian junaĝon kiel feliĉan. En Krakovo li finis 8-klasan novklasikan liceon kaj enskribiĝis al Filozofia Fakultato de Jagelona Universitato por studi tie filozofion.

La komenciĝinta en 1939 milito kaj okupado de Pollando fare de nazi-hitlerana Germanio komplete ruinigis vivon de lia familio, samkiel de la tuta juda popolo loĝanta en Pollando. La II Mondmiliton kaj periodon de Neniigo li travivis sub hitlera okupado, en Pollando, Germanio kaj Aŭstrio. Unue li ektroviĝis en Krakova Geto, de kie en 1942 lia patrino estis fortransportita al neniigkoncentrejo Bełżec kaj tie murdita. En la jaroj 1942–1945 li ektroviĝis en 4 hitleraj koncentrejoj: Płaszów, Wieliczka, Ma-

thausen, Linz, fine liberigita la 5<sup>an</sup> de majo 1945 de la Usona Armeo.

Postmilito li restis en Aŭstrio. Tie li daŭrigis studojn kaj en 1950 doktoriĝis pri filozofio en Viena Universitato. En 1951 li forelmigris al Usono, kie li konstante loĝis, kaj nur en 2005 li translokiĝis al Belgio, kie post unu jaro forpasis.

Lia patro ankaŭ estis fortransportita de germanoj al naziaj koncentrejoj, inter alie al Mathausen, kie li konatiĝis kun Szymon Wiesenthal, ankaŭ malliberigita tie. La patro de Julius Balbin alte estimis Wiesenthalon pro lia granda pena kaj justa postmilita aktivado, celanta eltrovi hitlerajn krimulojn, por ke ili estu juĝitaj kaj punitaj pro nepriskribeblaj krimoj, kiujn ili realigis kontraŭ la homaro, kaj aparte kontraŭ la juda popolo, kiun la nazi-hitlerana reĝimo destinis al kompleta neniigo. La patro konservis en sia danka memoro la polan kuraciston Czapliński, kiu helpis transvivi al li koncentrejon.

Julius Balbin trovis postmilito la patron en Praga hospitalo (tiam Ĉeĥoslovakio). Ambaŭ ekloĝis en Usono, kie la patro mortis en 1963. Ankaŭ lia fratino transvivis la periodon de Neniigo. Komence de la II Mondmilito ŝi ektroviĝis en la orienta parto de Pollando, okupita de Soveta Armeo. De tie ŝi estis deportita al Uralo, poste al Uzbekistano. Post fino de la milito ŝi elmigris al Israelo, kie ŝi loĝas kun sia edzo en Haifo. Laŭ ŝia frato, ŝi neniam intencis elmigri al Usono, feliĉa pri sia vivo en Israelo.

En komencaj jaroj de sia seltiĝo en Usono, Julius Balbin laboris kiel librovendisto, tradukisto kaj editoro. En 1959 li akiris sian unuan postenon kiel Asista

Profesoro en la Akademio de Komercaj Maristoj en Kingspoint, apud Novjorko. Post kvar jaroj de instruado de la rusa kaj franca lingvoj li enskribiĝis al Universitato Columbia por studi interlingvistikon science. En 1969 li estis nomumita Asocia Profesoro pri Fremdaj lingvoj en Essex County College en Newark, kie li instruis la francan, germanan kaj hispanan, fine ankaŭ la anglan lingvojn.

Instruante lingvojn al studentoj en diversstipaj altlernejoj li observis malfacilaĵojn, kiajn ili havas en lernado de fremdaj lingvoj. Li certiĝis, ke relative granda parto de ili, eĉ post pluraj jaroj de lernado, ne havas ŝancon de libera komunikado. Tiu konvinko igis lin serioze okupiĝi pri Esperanto, kiun li konis ekde gimnaziaj jaroj. Pri Esperanto kaj ligita idearo vekis lian intereson lia repetitoro pri algebro Julius Ortsman, tiama studento pri juro kaj magistro de filozofio, samtempe aktivulo de Krakova Esperantomovado. Pri lia engaĝiĝo, vasta aktivado kaj alta lingva nivelo atestas i.a. tio, ke ekde 1931 dum kelkaj jaroj li estis konstanta kunlaboranto de *Pola Esperantisto*, menciita surfronte de apartaj jarkolektoj de la revuo, eldonata tiutempe de prof. Odo Bujwid.

Sufiĉe abunda kaj diversspeca estas la verkaro de Julius Balbin.

Ekde 1963, kiam li ricevis la unuan premion en Belartaj Konkursoj de UEA por traduko de poemo de Jevgenij Jevtuŝenko „Babij Jar”, li ĉefe koncentriĝis je verkado de poemoj. En ĝia granda parto li esprimadis siajn pensojn, sentojn kaj traŭmon, ligitan kun periodo de Neniigo, kun siaj propraj ĉi-rilataj travivaĵoj, spertoj en geto kaj poste en naziaj neniigejoj, kie li same kiel ĉiuj aliaj judoj estis de-

stinita al morto, kaj el kiuj nur malgranda elcento mirakle travivis.

Lia verkado aperadis en pluraj revuoj. Ĝi ankaŭ estis publikigita en kelkaj kolektoj. La grandparto en Esperanto kaj la angla. En 1981 aperis „Strangled Cries” (Strangolitaj Krioj); 1986 — „The bitch of Buchenwald” (Hundaĉino de Buchenwald); 1989 — „Imperio de l’ koroj”; 1992 — „Damnejoj — Osiedla zagłady”, „Poemoj — Wiersze”; 1996 — „Inter vivo kaj morto”.

Pri alta aprezo de lia poezio atestas, ke 6 liaj poemoj troviĝas en fundamenta verko de Esperanta poezio: „Esperanta Antologio. Poemoj 1887–1981”. Tiu verkon okaze de 100-jariĝo de Esperanto pretigis la plej eminenta nuntempa Esperanta poeto William Auld (1924–2006). Menciindas, ke en tiu ĉi verko ek troviĝis nur eta ono de Esperantaj poetoj. Tiu-kaŭze la distingon de Julius Balbin oni devas konsideri kiel altan rekonon de lia poezio. Ĉiuj ses poemoj de Balbin troviĝantaj en tiu grandioza kolekto evidencigas sentemon kaj altan nivelon de lia poezio. Tamen aparte impresas tri lastaj, kiuj rilatas liajn proprajn travivaĵojn en la plej mora, kruela periodo de Shoa: „Enteriĝo de senŝtatulo”, „Lusia” kaj „Nia sola posedaĵo”.

Kiel signifan oni devas ankaŭ konsideri proksimigon al Esperantujo de valora kaj kortuŝa poezio de Adam Szyper, kiun li konsideras sia spirita frato, ĉar kiel infano li travivis Shoa kaj ĝi iasence daŭras en li.

La poemoj de Szyper tradukitaj de Balbin al Esperanto estis enmetitaj en volumon s.t. „Chcę tylko być” (Mi volas nur esti). Reciproke, Szyper tradukis aron de poemoj de Balbin el Esperanto al la pola. Temas pri s.m. kolekto „Damnejoj

— Osiedla Zagłady”. La volumo kun tiuj skuaj poemoj entute rilatas la periodon de Neniigo. Julius Balbin dediĉis ĝin al sia murdita patrino. Ambaŭ poezio–kolektoj tre zorgeme eldonis Edistudio Pizo (Italujo 1992).

Enkondukojn al ambaŭ verkoj skribis dr-ino Dorota Chróścielewska. Tiun de J. Balbin ŝi titolis La milito ĉiam ankoraŭ daŭras. Ŝi substrekas en sia enkonduko:

La poeto ne liberigis sin kaj li eĉ tion ne provis, de la milita kaj koncentreja hororo. En liaj verkoj ĉiam ankoraŭ daŭras la realeco krematoria, la infanoj ĉiam ankoraŭ estas endormigataj per gaso (la korskua poemo „Lulilo”), belaj, junaj knabinoj (la kortuŝa poemo „Lusia”) estas ŝetataj en kaĝojn kun murdohundoj, la etiko kreita de Emanuel Kant kun sia fama morala rajto estas forstrekita de liaj samlandanoj (la poemo „Al la germanoj”).

Julius Balbin esprimadis en siaj poemoj kaj aliĝenraj verkoj ne nur nepriskribeblan pasinton. Nepriskribeblan pro neimagebla krueleco. Li esprimadis ankaŭ sian maltrankvilon, mankon de interhoma ekvilibro, endanĝerigo daŭre ekstreme evidentiĝanta vaste en nuntempa mondo.

Tiamaniere li klopodis kontribui al pli humana mondo. Vehiklante, Zamenhofan homaranismon per Zamenhofa lingvo. Evidente, malgraŭ kruelaj spertoj li iel esperis, ke per arto eblas almenaŭ iugrade kontribui al pli justa, pli homeca kunvivado. Pro sia idealisma altnivela verkado li meritas esti neforgesita.

Pri forpasintoj oni diras: „Iliaj spiritoj estingiĝas kiam ili restas en forgeso...”.

Julius Balbin ne devas esti forgesita. Li restu per sia celado, verkado en niaj memoro kaj koro.

**Zofia Banet–Fornalowa**

## **Pastro Henriko PARUZEL (1913 – 1977)**

En la nuna jaro pasas tridek jarojn de la morto de Pastro Henriko Paruzel — la multjara animzorganto de polaj katolikaj esperantistoj.

Herberto Henriko Paruzel naskiĝis en Bytom–Rozbark la 4<sup>an</sup> de septembro 1913 kiel dektria infano de malriĉaj gepatroj, Francisko kaj Jozefino. Elementan lernejon li frekventis en Piekary Śląskie, poste li elektis malpli grandan Seminarion de Pastroj Oblatoj (1927–1933), kie li komencis interesiĝi pri Esperanto kaj pri muziko. Li pastrigiĝis en elektita Ordeño la 18<sup>an</sup> de junio 1939.

Post la eksplodo de dua monda milito li forveturis al Romo (1940), kie intencis studi en Gregoriana Universitato. Tio okazis malebla pro eksteraj cirkonstancoj, do la fervora pastro volis aktive labori. Pro tio li veturis al Francio, kie li ricevis tuj la taskon esti animzorganto de poloj, same kiel li estintaj eksterlande. Dum ok jaroj li multe vojaĝis, organizis, kelkfoje estis paroĥestro, verkis multajn alvokojn kaj artikolojn ĉefe por kuraĝigi kaj plifortigi la kredon, esperon kaj persiston inter homoj dum tiama terura tempo.

Post la reveno al Pollando (1948) li laboris efike en Gorzów Wlkp., Połczyn Zdrój, Róża Wielka, zorgante precipe pri religia eduko de infanoj kaj gejunuloj. Samtempe li dediĉis sin al disvastiĝo de la Internacia Lingvo por alproksimigi reciproke homojn, instigante ĉiujn kristanojn al tiu ĉi alproksimigo kaj al la ekumena agado. Tiu ideo konkeris lin plentute. Ĉiam ege laborema, sindona kaj helpema li servis al ĉiuj.

De 1948 ĝis 1974 li estis prezidant-

to de Pola Katolika Unuiĝo Esperantista (PKUE). Dum tiu tempo li bone organizis, plivigliĝis kaj fortigis E-movadon en eklezia medio ne nur en Pollando sed en pli vasta fono, estinte samtempe tre agema IKUE-ano, ĝia komitatano kaj estrarano. Ĝis la lastaj tagoj de sia riĉoplena vivo li restadis iniciatinto kaj kunorganizanto de diversaj E-aranĝoj, laboroj, entreprenoj. Grandparte danke al lia helpema instigo estis organizata centra IKUE-Biblioteko ĉe Katolika Universitato en Lublin, stabilita en Romo loko de Centra Oficejo de IKUE kaj valorega biblia leksikono. Kiel aktiva membro de Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj kaj redaktoro de *Biblia Revuo* li multe ekfaris por ekumena traduko de la Biblio.

En 1975 plenumiĝis unu el liaj revoj — efike helpante al multaj poloj ĉeesti en Sankta Jaro la 36<sup>an</sup> IKUE-Kongreson, li mem predikis en Esperanto dum tiamaĵ tagoj en la Baziliko de S-ta Petro en Romo. La plenumon de lia dua vivrevo — organizi kaj partopreni en la 37<sup>a</sup> IKUE-Kongreso en Częstochowa li ne ĝisvivis. Li planis ankaŭ kongresi en Jerusalemo kaj fondi en Romo la Esperantan Ekumanan Instituton sed

Nek tag', nek horon scias ni,  
kiam alvenos mort'.  
Kiel ŝtelisto agas ĝi  
kaj batas ĝis sen vort'.

Ĝuste la morto trafis lin ĉe la sojlo de hejmo — la 17<sup>an</sup> de januaro 1977, kiam post trimonata vojaĝo li estis revenanta al Pollando kun novaj planoj kaj novaj fortoj plu labori kaj realigi siajn grandajn revojn. La tragika vojakcidento finigis lian noblan vivon surteran.

Pastro Henriko Paruzel estis ankaŭ aŭtoro de nova originala skribometodo

de muziknotoj, nomata MUZILO. Tiu sinteno ebligas tre facile ludi per diversaj muzikinstrumentoj. Li eldonis multajn fak-kajerojn „Muzilo” kun transskribo en nova metodo de diversaj kantoj, himnoj kaj famaj muzikverketoj. Li iniciatis viglan muzilan movadon, disvastigitan en diversaj landoj danke al kunligo de tiu metodo kun Esperanto.

**Stanisław Śmigielski**

## **Al pastro Henriko Paruzel**

Vi ne plu povas agi,  
eble vi tion  
ne emas,  
ĉar Vi kuŝas  
silente  
en la tero  
kaj ne rigardas,  
kio en la mondo  
okazas.

Vi ne plu povas agi,  
ĉar via korpo  
mortis.

Ĉu povas animo  
sen korpo batali?  
Ĉu povas animo  
sen korpo deziri?

Se tio eblas,  
sciu, ke ĉio el mi  
estas via,  
miaj sopiroj ankaŭ!

Inspiru min,  
instigu min,  
subtenu min!  
Mi batalos  
kiel Vi!

**Lina Gabrielli**  
**Ascoli Piceno, Italio**

## El historio de la animzorgado

Al kelkaj homoj ŝajnas mirige, ke Ludoviko Zamenhof, kuracisto de la varsoviaj mizeruloj judaj (1859–1917), en la ekumena spirito estis la iniciatinto de la katolika animzorgado de esperantistoj.

Jen kiel tio fariĝis. En la jaro 1887 li eldonis en Varsovio la unuan lernolibron de Esperanto: *La internacia lingvo*, en kiu sur la unua loko inter la tekstoj metis la Preĝon de la Sinjoro, plue tekston el la Malnova Testamento... kiel la fundamentajn fontojn de la vortaro kaj stilistiko.

La lernolibron li presis ankoraŭ ses foje dum la vivo, neniam ŝanĝante ties religian karakteron.

La unua lernanto estis pastro kano-niko el Vilniuso, posta prelato, entombigita en la katedralo de Kaŭnaso, p. Aleksandro Dąbrowski-Dambraŭskas (1860–1938). Li ankaŭ estis la unua tradukanto de polaj kantoj religiaj al Esperanto, kiujn laŭlingve korektadis al li Zamenhof mem.

La 26<sup>an</sup> de decembro 1896 p. Dąbrowski celebris la unuan sanktan meson por internacia kunveno de esperantistoj en Smoleńsk. La meso estis celebrita latine, sed la prediko kaj kantoj Esperante. En tiu ĉi sankta meso partoprenis ankaŭ L. Zamenhof. Tio ĉi estis la oficiala inaŭguro de la animzorgado por esperantistoj.

En la jaro 1905 okazis la unua Internacia Kongreso de Esperantistoj en Boulogne sur Mer — Francujo. Zamenhof malfermante la Kongreson komencis ĝin per la ekumena preĝo, kiun li mem verkis, agnoskante kaj respektante ĉiujn diferencojn religiajn, en kiu sur la unua loko metis la kristanojn: *kristanoj, hebreaoj kaj mahometanoj!* — *Ni ĉiuj de Di' estas filoj...*

Granda amiko kaj propagandisto de

Esperanto estis la rusa verkisto Lev Tolstoj (1828–1910). Li presis en diversaj ĵurnaloj kaj inter alie jene: *Ĉar internaciaj konfliktoj ofte eksplodas pro malkompreno... Pro tio lernado de Esperanto kaj ties propagando sendube estas la kristana afero, kiu kontribuas al realigo de la Dia Regno — la afero, kiu estas la ĉefa kaj ununura misio de la homa vivo* (Enciklopedio de Esperanto pp. 540–541).

La sekva katolika aganto de Esperanto estis bibliisto, p. Emile Peltier, prof. en la Porpastra Seminario en Tur (Francujo), entombigita en Lourdes (1870–1909), eldonisto de la katolika monata revuo en Esperanto, *Espero Katolika* de la jaro 1903, kiu ricevis Imprimatur de la loka episkopo kaj en la jaro 1906 de Papo Pio la X.

Ĉe la okazo la papo diris: *Esperanto estas la popola latino kaj havas antaŭ si grandan estonton* (laŭ *Espero Katolika*). La revuo aperadas ĝis nun en Romo kaj estas la plej malnova Esperanto-gazeto.

Al la esperantistaro oni povas kalkuli ankaŭ episkopon Bandurski el Krakovo kaj Diservanton, episkopon Konstanty Dominik el Pelplin, la urbo de nunjara Esperanta Ekumena Kongreso (EEK), kiu en sia Porpastra Seminario fondis rondon de esperantistoj (Koło esperantystów).

Speciale meritoplena esperantisto estis beata arkiepiskopo Georgo (Jerzy) Matulewicz (1871–1927), kiu en *Gazeta Kościelna* (33/126, pp. 187–188) skribis interalie: *Esperanto en servo de katoliki-smo...*

Estas konate, ke inter provoj de internacia lingvo, Esperanto plenumis plej bone sian rolon kaj nune ĝi estas ĉie konata... Plej efike uzadas ĝin komunistoj,

socialistoj, liberpensuloj, masonoj, judoj kaj sektanoj... Teroristoj uzadas Esperanton efike al siaj celoj kaj la katolikoj plej ofte atendas, kvazaŭ ili timus malpurigĝi per Esperanto...

Tamen estus malprudente ne uzi la lingvon pro tio, ke verkis ĝin Judo.

Al ni plej gravas... ke Esperanto povas alporti profiton al la katolikismo...

Kiam sankta Maksimiliano Kolbe forveturis al Japanio, li skribis al alumnoj el Niepokalanów ĉe Varsovio, demandante, ĉu ili povas lerni Esperanton. Responde li skribis: Nia monatrevuo *Kavaliro de la Senmakula* en Esperanto trovas certajn sukcesojn ankaŭ tie ĉi, en Japanujo...

„Via partopreno en la monda Esperanto-movado plaĉas al la Senmakula!” (subskribo de votaĵo en la Baziliko de Niepokalanów).

L' *Osservatore Romano* el la tago 15 VIII 1975 publikigis tekston de saluto, kian dum ĝenerala aŭdienco papo Paŭlo la VI eldiris al la partoprenantoj de la 36<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, kiu estis organizita en Romo:

Ni nun adresas nian saluton kaj bondeziron al la partoprenantoj En la 36<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj. Al viaj apartaj, kulturaj celoj, vi aldonis noton pure religian, enŝovante Vin en la spiriton de la Jubileo, kiu al ĉiuj bonvolemaj homoj parolas pri renoviĝo, pri konvertiĝo, pri retrovita kontakto kun Dio, kiu amas kaj pardonas. Tiu ĉi spirito gvidu vin en la antaŭenigo de frateco kaj kompreno inter la diversaj popoloj kun diferencaj lingvoj, laŭ la programo, kiu distingas vin. Jen nia sincera bondeziro, kiun ni plivalorigas per nia apostola beno, favoranta la akiron de la *Diaj gracoj*.

En la Kongreso partoprenis episkopo Ladislao Miziołek, la esperantisto, kiu

multe da tempo kaj koro dediĉis al la Katolika Esperanto-movado. Liamerite estis agnosko (flanke de Vatikano) de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kiel la katolika organizaĵo. Ankaŭ li estis estro de la Internacia Liturgia Komisiono, kiu prilaboris novan tradukon de la Roma Meslibro, kiun la Kongregacio por la Kulto kaj Sakramentoj aprobis la 8<sup>an</sup> de novembro 1990. Por uzado en la tuta mondo.

Diservanto kardinalo Primaso de Pollando Stefano Wyszyński dum la intervjuo kun p. Duilio Magnani diris: *Dum la II Vatikana Koncilio montriĝis fiasko de la lingvo latina... La sekva Koncilio devos uzi Esperanton* (Radio Vaticana, 10/1975, p. 13).

En la jaro 1977 estis aranĝita sur la Hebra Monto, en la pola urbo Czenstoŭovo, la 37<sup>a</sup> IKUE-Kongreso. Tiama kardinalo Karol Wojtyła estis ĝia protektanto. Li skribis en la Kongreslibro la jenajn vortojn: *Patro Sankta, konservu en Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu kiel ni (Joh. 17:11). Kiel Jesuo Kristo preĝis por siaj disĉiploj pri la unueco, tiel same mi, en nomo de la Eklezio, preĝas viaintence. Unu kredo kaj unu amo helpu al vi unuigi la disbatitan mondon en unu ŝafaron kaj sub unu Paŝtisto.*

Unu supernacia lingvo Esperanto servu efike al tiu nobla celo. En mia nomo kaj en nomoj de multaj favoraj al Vi polaj episkopoj mi benas vian agadon kaj deziras al vi la *Dian gracon*.

Pli posta papo Johano Paŭlo II sed ankaŭ lia posteulo Benedikto XVI dufoje dum la jaro uzadas Esperanton, en la vortoj de URBI ET ORBI, kiun transdonas inter aliaj radioj Radio Vaticana disaŭdiganta ankaŭ en Esperanto.

Jozefo Zielonka



## Esperanta Didaktika Seminario en la Ĉina Budhisma Templo „DUOBAO“

La 24<sup>an</sup> de junio okazis en la belega budhisma templo „Duobao“ (la signifo estas „multaj trezoroj“), en la urbo Sanmen („tri pordoj“), oriente de Ĉinio, seminario–kurseto pri la didaktiko de Esperanto. Ĝi konsistis el du klasoj, po du horoj, por la budhismaj bonzoj kaj aliaj ĉeestantoj, kun ĉeesto de la s-roj Miaohui, bonzo de tiu templo, organizanto de la seminario, kaj la profesoroj de Esperanto s-roj He Benfa, esperantisto el Anhu, kaj Liu Baoguo, instruisto de Esperanto en universitato de Hefei. Gvidanto de la seminario estis Aŭgusto Casquero. Unuafoje en sia vivo li instruis piednude.

La sperto estis ege interesa kaj pozitiva. La etoso varma. La vetero varmega. Ĉiuj ĉeestantoj aktive partoprenis la klasojn, kun granda intereso. Ili petis ripe tiun seminarion en alia momento, sed pli longa, por bone lerni la teknikojn de la instruado de Esperanto.

La bonzoj ĉeestantaj vere diligente lernis, kaj kun granda intereso partoprenis.

La dutaga restado en Duobao estis vere neforgesebla. Belega templo, nun



en rekonstruo ĉar ĝi estis detruita dum la tiel nomata „Kultura Revolucio“ (kia kulturo!). La nuna abato–guruo, kiu afable akceptis la partoprenantojn, estis tiam torturita kaj oni tranĉis liajn ambaŭ kruurojn. Li plej afable ofertis apogon al la Esperantaj aktivaĵoj de la bonzoj.



La budhisma branĉo–skolo de tiuj bonzoj estas la tibeta. Pro tio oni rekonstruas la templon en tibeta stilo, kun la helpo de tibetaj artistoj (pentristoj, skulptistoj, ktp.). Ĝi troviĝas en ege bela loko, ĉirkaŭita de belaj montoj kaj naturaj areoj, ne tro malproksime de la maro.

La organizanto de la seminario, bonzo Miaohui, zorgis pri ĉiu detalo kaj bezonaĵo. Bonege gastigis la ĉeestantojn en la templo, kaj helpis en ĉio bezonata, krom tre bone ĉiĉeroni.

S-ro Miaohui estas sufiĉe konata en la ĉina Esperanta movado. Ekde la templo, kaj ĉefe pere de Interreto (li havas ĉiujn teknikajn bezonaĵojn), li instruas Esperanton, aktivigas homojn, donas konsilojn, kuraĝigas la esperantistojn. En la budhisma flanko li ankaŭ tre aktivis per la reto, konsilas, instruas, motivigas, kulturigas. Senlaca. Li estas preta helpi en ĉiu horo. Ĉiam li estas dispone, kompreneble ne forgesante siajn devojn en la templo. Li estas tradukisto el la ĉina lingvo al Esperanto de granda kvanto da budhisma literaturo.

**Augusto Casquero**

## La prepozicio PRETER en praktika uzado

Tiu ĉi prepozicio estas montranta objekton aŭ lokon, ĉe kies flanko okazas movo (t.e. en kies proksimeco iu aŭ io pasas, irante pluen). **Ekz.:** Li pasis **preter** mi sen saluto kaj poste li iris tute proksime **preter** la grupo da virinoj (li pasis flanke de ili). Ŝia vojo kondukis **preter** la tombeja muro. Soldatoj iris en parada marŝo **preter** la Monumento de Libereco. Multaj kolomboj flugas ĉiutage **preter** la turo de la urbodomo. Traflugis muŝo **preter** mia orelo. Li dronis en la rivero fluanta **preter** la urbo. La kirla uragano pasis **preter** nia vilaĝo (= La kirlotvento feliĉe ne atingis ĝin).

**Rimarko 1.** La prepozicio **preter** povus ankaŭ montri lokon, kiu estas atingebla per movo flanke de io. Tiaj frazoj estas tamen tre maloftaj. **Ekz.:** Mia domo troviĝas **preter** altaj juniperoj. Se vi volas atingi mian domon, vi devas iri **preter** la juniperoj.

**Rimarko 2.** Por klare montri, ke la movo ne ĉesas sed plu daŭras post la koncernata objekto, L. Zamenhof uzis plurfoje akuzativon. **Ekz.:** Ĝi iris al li **preter la buŝon** (= Li ne sukcesis profiti de ĝi). La vojo kondukis **preter preĝejon** (= La vojo ne finiĝis ĉe la preĝejo).

En *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* troviĝas tamen jena frazo: „Neniam oni uzu akuzativon post la movaj prepozicioj: **de, el, preter, al, ĝis**, ĉar ili per si mem jam esprimas sufiĉe la movon”.

**Rimarko 3.** Praktikata estas ankaŭ figura uzo de la prepozicio **preter**. **Ekz.:** Li agas **preter** ĉia racio (= Li tute ne uzas racion). La pesto pasis **preter** tiu urbo (= La pesto ne trafis tiun urbon).

**Vortfarado: pretere** (= preter io). **Ekz.:** La arbaro ne estis densa kaj **pretere** (= preter la arbaroj) ni vidis imponan arbargardistejon.

**La prepozicio „preter” funkcias ankaŭ kiel prefiksoido:**

**preteriri** (= iri laŭlonge aŭ flanke de io kaj ĝin lasi post si). **Ekz.:** Dum urbovizitado ni malrapide **preteriris** antaŭ impona amfiteatro;

**preterpasi** (= pasi preter iu aŭ io). **Ekz.:** Ni **preterpasis** la grupon da handikapuloj. Li **preterpasis** ŝin je kelke da paŝoj;

**preterpaŝi** (= preteriri paŝante). **Ekz.:** Li preterpaŝis la falintan homon;

**preterlasi** (= lasi iun preteriri). **Ekz.:** Neniu volis halti, por **preterlasi** la alian. Ŝi **preterlasis** kelkajn erarojn en la teksto. Esperantistoj ne **preterlasis** la okazon partopreni la 29<sup>an</sup> ĈEP-aranĝon en Mielno;

**preteratenti** (= ne rimarki ion pro alidirekta atentado aŭ pro manko de atento). **Ekz.:** Li preteratentis multajn erarojn en sia korektado;

**preterkuri** (= kuri preterante). **Ekz.:** Mi **preterkure** diris nur kelkajn vortojn al li. Ŝi menciis nur **preterkure** pri sia

malfeliĉo;

**preterflui** (= flui preter io). **Ekz.:** De sur la balkono ni atenteme rigardis **preterfluantan** malsupre homamason;

**preterflugi** (= preterpasi fluge). **Ekz.:** Ŝi nur **preterfluge** aŭdis ion pri la decido de UEA kongresi post du jaroj en Pollando;

**preterveturi** (= veturi preter io sen-mova). **Ekz.:** Mi **preterveturis** apudvojan vilaĝon kaj haltis en la proksime situanta urbeto. Rapida trajno **preterveturas** malgrandajn stacidomojn;

**preterŝoviĝi** (= pasi preter). **Ekz.:** Maljuna virino en funebra vesto malrapide **preterŝoviĝis** antaŭ ni;

**preterdistanci** (= lasi post si en ia distanco). **Ekz.:** Ŝia rajdĉevalo **preterdistancis** la sekvintan rajdiston je kelke da metroj;

**pretervidi** (= ne rimarki ion, kion oni devus rimarki). **Ekz.:** Skribante leteron al mi ŝi **pretervidis** kelkajn tajperarojn;

**pretervola** (= okazanta malgraŭ ies volo). **Ekz.:** **Pretervola** edziĝo feliĉon ne donas. La larmoj **pretervole** fluis ĉe li sur la vangoj;

**preterpafi** (= pafi tiamaniere, ke la pafaĵo pasis **preter** la celtabulo).

En la *Proverbaro Esperanta* prilaborita de Ludoviko Zamenhof mi trovis nek unu proverbon kun la prepozicio **preter**, do mi decidis elekti kelkajn proverbojn pri nia **vivo**:

Vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas.

Vivon travivi estas art' malfacila.

Vivanton ni malhonoras, mortinton ni adoras.

Vivi modere, ne tro interne, nek tro ekstere.

Vivo modera estas vivo sendanĝera.  
Vivo sen modero kondukas al mizero.  
Vivu mizere, sed vivu libere!  
Vivi kun iu kiel hundo kun kato.  
Vivi kun iu en intima amikeco.  
Vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu!



## Jubileo de la Teatro „ESPERO”

Neimageble... tamen vere! Unupersona Esperanto-teatro de Jerzy Fornal funkcias jam 25 jarojn! Dum tiu periodo estis prezentitaj 17 monodramoj en Pollando, kie ĝi fondiĝis en 1982, sed ankaŭ vaste en la mondo: en pluraj landoj de Eŭropo, en Argentino, Brazilo, Israelo, Japanio kaj Sovetio — ludinte dum kongresoj, konferencoj kaj aliaj esperantistaj aranĝoj.

La temaro de monodramoj ĉiam enhavas iun mesaĝon, vehiklas sociajn problemojn akordaj al idealoj de Esperanto, kiel batalo por paco kaj justo. Kelkaj rilatas grandajn personecojn, kiuj ne kapablas akordiĝi al regantaj soci-politikaj cirkonstancoj, idealistojn, kiuj restas ekster la „organizita, civilizita” socio.

Dum sia kvaronjarcenta aktivado la Teatro „Espero” prezentis centojn da spektakloj. Nur en sia konstanta teatrejo — Muzeo de Azio kaj Pacifiko — Art' Galerio „Nusantara” en Varsovio — dum lastaj 15 jaroj prezentis 150 spektaklojn. Al 10 spektakloj estis prilaboritaj konformaj broŝuroj kun scenarioj, recenzoj kaj fotoj. Komence de ĉiu sezono la spektantaro ricevas planon – repertuaron por la kuranta sezono (ni publikigos ĝin en la sekva numero).

La teatron gvidas Zofia Banet-Fornalowa, kiu antaŭ ĉiu spektaklo aŭdigas prelegon, ofte diskonigatan en multaj Esperantaj gazetoj kaj revuoj (*Monato*, *Literatura Foiro*, *Heroldo de Esperanto* — en ĉi lasta ŝi gvidas konstantan priteatran rubrikon.

# Finigis la 92<sup>a</sup> UK de Esperanto

## Probal Dasgupta iĝis prezidanto de UEA, Barbara Pietrzak – la ĝenerala sekretario



Komence de la lunda kunsido de la komitato de UEA en Jokohamo estis diskonigita la rezulto de la fermita baloto pri la nova estraro de UEA. La nombrado de la balotiloj montris, ke la komitato elektis estraron laŭ la rekomendoj de la elekta komisiono, tamen sen Marija Belošević el Kroatio. La nova prezidanto de UEA ekde lundo do estas Probal Dasgupta el Barato. Por Probal Dasgupta voĉdonis 49 komitatanoj, por Marija Belošević nur 9. „Ni okupiĝu ne nur pri la lingvo Esperanto, sed ankaŭ pri interkompreno”, diris Probal Dasgupta post sia elektiĝo.

La nova estraro de UEA havas sep membrojn: Ranieri Clerici el Italio vicprezidanto, Probal Dasgupto el Barato (prezidanto), Loes Demmendaal el Nederlando, Hori Jasuo el Japanio, Claude Nourmont el Luksemburgio (vicprezidanto), Barbara Pietrzak el Pollando (ĝenerala sekretario) kaj José Antonio Vergara el Ĉilio.

**El la sep estraranoj**, tri estas virinoj, kaj same tri ekstereŭropanoj. El la malnova estraro de UEA restas nur Claude Nourmont.

El la personoj kiujn rekomendis la elekta komisiono, ne estis elektita kiel estrarano Marija Belošević el Kroatio. La landa asocio de UEA en Kroatio pli frue forte protestis kontraŭ ŝia elekto, ĉar ŝi fondis kaj gvidas konkurantan tutlandan asocion en Kroatio. Nur 9 komitatanoj voĉdonis por ŝia elekto, 36 voĉdonis kontraŭ, kaj 7 sin detenis.

Plej multajn voĉojn el la elektitaj estraranoj ricevis Probal Dasgupta, entute 49 por, 2 kontraŭ kaj 1 sindeteno. Sur dua loko estis Loes Demmendaal (46-3-3), poste sekvis Claude Nourmont (45-5-2), Barbara Pietrzak (44-4-4), Hori Jasuo (38-9-5), Ranieri Clerici (38-12-2) kaj José Antonio Vergara (37-10-5).

**Jam en sabato** la komitato de UEA decidis unuavice voĉdoni nur pri la kandidatoj rekomenditaj de la elekta komisiono. Ĉar el tiuj ok kandidatoj la komitato sukcesis elekti sepmembran estraron, oni neniam voĉdonis pri la aliaj estraraj kandidatoj, kiujn ne rekomendis la elekta komisiono: Yves Bellefeuille, Maritza Gutiérrez kaj Amri Wandel. La situacion dum la komitatkunsido komentis **Amri Wandel**:

— Pluraj pledis por ke oni povu elekti inter ĉiuj 11 kandidatoj. Tio estis teknike farebla, sed la voĉdonilo disdonita ne spegulis la situacion. Estis absurda situacio: por voĉdoni por la aliaj 3, pli ol duono de la komitatanoj devus voĉdoni kontraŭ iu kandidato. Mi estas en situacio de ‘deja vu’: en 1998, mi kandidatis, sed la komisiono lastminute elprenis mian nomon. En 2007, mia nomo ne aperis en la balotilo. Mi ne havas aparte amarajn sentojn; mi plu laboros por UEA. Tion vi konsideru nome de la 3 kandidatoj kiuj eĉ ne povis ricevi voĉojn — li diris, kaj ricevis aplaŭdojn.

**Post la diskonigo** de la rezulto, novaj estraranoj mallonge elpaŝis.

— Ni okupiĝu ne nur pri la lingvo Esperanto, sed ankaŭ pri interkompreno — diris Probal Dasgupta.

— Lingvo estu vera homa rajto, sed kiel formuli tion? Mi surpriziĝis, ke eĉ mi ne scias kiel mi vortumu tion — diris Ranieri Clerici.

Barbara Pietrzak opiniis, ke UEA estu „nukleo respektata inter la neregistraj organizoj”, kaj ke oni deziru kaj volu membri en ĝi.

**La ĝenerala direktoro** de UEA, Osmo Buller, dankis al Renato Corsetti kaj la eliranta estraro. Ŝajne aludante al komunikado de la Esperanta Civito li diris:

— Nia kunlaboro estis tiel bona, ke mediteranea skandal-gazeto ne plu sciis kion diri pri tio kaj eksilentis entute.

La estrara kaj financa raportoj estas akceptitaj unuanime, kun du sindetenoj.

Libera Folio

## STATISTIKO DE LA 92a UK

Al la 92<sup>a</sup> UK de Esperanto en Jokohamo aliĝis 1901 esperantistoj el 57 landoj. La dua UK en Japanio estis do pli multnombra ol la unua, kiu okazis en Tokio en 1965 kaj arigis 1710 aliĝintojn. En Jokohamo ĉeestis krome 160 personoj, kiuj aĉetis 196 unutagajn kartojn. La oficiala statistiko de UK-aliĝintoj, kiu aperas i.a. en la Jarlibro de UEA, tamen ne inkluzivas aĉetintojn de unutagaj kartoj. Plej multe da kongresanoj, 1024, liveris la gastiganta lando Japanio. Minimume 10 aliĝintoj venis el Francio (94), Korea Respubliko (91), Germanio (62), Ĉinio (57), Litovio (49), Italio (46), Rusio (35), Pollando kaj Usono (po 34), Brazilo kaj Nederlando (po 32), Britio kaj Hispanio (po 24), Irano kaj Svedio (po 19), Finnlando, Kroatio kaj Svislando (po 18), Aŭstralio, Belgio kaj Bul-

gario (po 16), Ĉeĥio (12), Hungario kaj Israelo (po 11), kaj Slovakio kaj Vjetnamio (po 10).

## Rezolucio de la 92a Universala Kongreso de Esperanto

**La 92a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) kun 1900 partoprenantoj el 57 landoj kun la temo „Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”,**

**Konstatinte**, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter „Okcidento” kaj „Oriento”, sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

**Konstatinte**, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

**Notinte**, ke tro rigidaj konceptoj pri „Okcidento” kaj „Oriento” malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

**Notinte kun kontento**, ke la 2008a jaro estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

**Rekomendas**, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

**Konfirmas** la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

**Atentigas** samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperantokomunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

**Deklaras**, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondo-partoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

**Esprimas** la senkondiĉan subtenon de

la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.

## Salutmesaĝo de Probal Dasgupta

Estimataj geamikoj!

Mi estas estimanto de la amikecoj. Mi salutas vin en la nova rolo de via prezidanto, kiu havas la privilegion devon konstante aŭskulti vin. Esperanto estas specife amika kaj aŭskultema lingvo.

Ni donis unikan formon al nia helpemo ekde 1914. Dum la Unua Mondmilito ni peris mesaĝojn, manĝaĵojn, medikamentojn inter la militantaj landoj. Ĉu nur dum milito aperas tiaj urĝoj? Ne! Ĉiam ekfajras krizaj bezonoj, ĉu pro subita tertremo ie, ĉu pro konstanta nutraĵomanko aliloke. Niaj helpemaj komunik-rimedoj devas ĉiam esti pretaj aŭdi la petojn de akutaj bezonantoj kaj trovi kapablulojn, kiuj tuje kaj taŭge fajrobrigados la fajrojn — precize kiel dum militoj.

Ĉu tia ĝeneralega, skolta helpemado — okupiĝanta pri viktimoj de inundoj, de malsatego, de tertremoj — estas vere prioritata en movado por neŭtrala mondlingvo? Ni jam respondis tiun demandon en 1914. Jes ja.

Ni estas helpema lingvanaro; ni kredas, ke la lingvoj devas per neŭtrala pontado plibonigi sian komunikreton. Kial? Ĝuste ĉar la plej drastaj suferantoj bezonas esti atingataj kaj servataj fulmrapide. Eĉ sur pli banala nivelo, ni ĉiuj ja scias, ke la delegita reto kaj aliaj UEA-strukturoj estas absolutaj antaŭkondiĉoj por nia kolektiva ekzisto, pli gravaj ol la gramatiko.

La nuna estraro laboras por plifirmigi niajn instituciojn, ĝuste ĉar ni vidas en ili la esencon kaj estontecon de la Zamenhofa lingvo. Venas 2008, kiun UN deklaris la Internacia Jaro de la Lingvoj; kaj ni centjariĝos! Vi, kiuj kongresas, kaj precipe tiuj inter vi, kiuj staras ĉe la sojlo de UEA kaj ne en nia anaro, bonvolu ja aliĝi al la Asocio kaj kunagi kun ni! Vi trovos, ke ni helpas atingi ankaŭ viajn celojn.

## Dasgupta: „Ni devas konstrui harmonion en niaj institucioj”

La nova prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, vidas kiel aparte urĝan taskon kreskigi la harmonion, kunlaboron kaj interkomprenon inter la esperantistoj. „Ni devas en nia uzado de Esperanto realigi la ideon ke ni fakte ne parolas Esperanton, se ni ne parolas interkomprene. Alivorte, mi volas ke la vortoj Esperantoj kaj interkompreno fariĝu sinonimaj” — li diras en intervjuo de Barbara Pietrzak, dissendita de Pola Radio la 8<sup>an</sup> de aŭgusto. Barbara Pietrzak mem estis elektita en la novan estraron de UEA kaj iĝis ĝenerala sekretario, sed sian propran duoblan rolon ŝi ne mencias en la intervjuo.

**Probal Dasgupta:** Mia ĉefa mesaĝo al la esperantistoj kiuj interesiĝas pri UEA, ne nur tiuj en UEA, sed tiuj ekster UEA, kaj kiuj aŭskultas ĉi tiun radio-elsendon, estas ke mi estas ĉefe por la kontinueco en niaj institucioj, ĉar ni devis multe lukti kaj labori por krei niajn nunajn instituciojn. Kaj kiajn ajn ideojn ni ĉiuj havas, kaj mi havas kelkajn frenezajn ideojn, ni devas havi la samajn instituciojn por realigi ankaŭ novajn ideojn.

**Barbara Pietrzak:** Kaj tiuj novaj ideoj revoluciigos la movadon?



Mi esperas, sed mi ne scias ĉu mi sukcesos konvinki la aliajn pri tio. Sed tian taskon havas ni ĉiuj.

**BP: Kiu estas do tiu plej grava mesaĝo, via opinio, kiun ni devus almenaŭ konsideri realigi?**

Por mi la plej grava mesaĝo estas, ke same kiel en la 18<sup>a</sup> jarcento iuj francaj ideologoj kreis la ideon ke por ke frazo estu en la franca, ĝi devas esti klara, same”.

**BP: Ĉu ili ne estas?**

Bedaŭrinde ne. Ni ofte uzas Esperantajn vortojn por malpaci. Ekzemple por ĉiu laboro proponas sin dek homoj kun dek malsamaj konceptoj, kaj ili donas dek versiojn de la laboro, kaj tiel fuŝas la laboron, anstataŭ veni kunen kaj fari ion kune. Tre ofte, ne ĉiam, sed tre ofte.

**BP: Do, kia estas via vizio de la laboro de la nova estraro, kiu fakte formiĝas ĉi tie en Jokohamo? Kiamaniere vi pensas ke devas labori la estraro?**

Mi kredas ke la nova estraro jam sufiĉe konas unu la alian de antaŭe, ke ĝi povos harmonie kunlabori senprobleme. La tasko estas konstrui tian harmonion en multaj aliaj lokoj de niaj institucioj. Kaj tio estas laŭ mi aparte urĝa tasko. Tial mi diras, ke Esperanto devas antaŭ ĉio esti punta lingvo, ke ni devas kreskigi la pontecon de Esperanto ankaŭ en nia propra socio.

**BP: Kaj la ekstera mondo? Ni kaj la ekstera mondo?**

Tie ŝajnas al mi, ke al la ekstera mondo la esperantistoj precipe je la loka kaj landa nivelo povas levi la torĉon kaj diri ke ni estas la homoj kiuj konscias pri la lingva flanko de la rilatoj inter „ni” kaj „la aliaj”, ni kaj niaj najbaroj. Do, ni povas fariĝi, ni, esperantistoj, povas fariĝi

en ĉiu loko kvazaŭ la kultura konscienco de la loko. Estas demando kiamaniere tion realigi, kaj kompreneble ĉiu lando, ĉiu urbo havos siajn proprajn respondojn al tio, kaj tiel devos esti.

**BP: Koran dankon pro tiu ĉi opinio. Certe ni havos plurfoje la okazon gastigi vin antaŭ nia mikrofono. Aliflanke eble estas ankaŭ grave memori al niaj aŭskultantoj, ke vi transprenas la plej altan postenon en la Universala Esperanto-Asocio, kiu en la 2008a jaro havos sian tute apartan jubileon, tamen vi ankaŭ siatempe en tiu ĉi sama asocio volontulis, kiel junulo.**

Jes, en 1980, dum preskaŭ unu tuta jaro, mi estis volontulo en la Centra Oficejo Roterdama de Universala Esperanto-Asocio, kaj mi aparte ĝojas povi reveni en alia rolo al tiu mia asocio, de kiu mi estas dumviva membro jam de 1970.

**BP: Do, ni gratulas pro tiu ĉi dumviveco, kaj fakte ĝojas, ke la prezidado de la asocio transprenas persono, kiu kvazaŭ... eblas diri avancis, sed tamen, spertis diversajn ŝtupojn de la organizita vivo kadre de UEA.**

Jes, kaj mi estis ankaŭ prezidanto de la landa federacio...

**BP: Pro tio mi diras diversaj ŝtupoj... interalie ni povus mencii ĉiujn viajn postenojn.**

Do, mi estas vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, mi restas vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj estas multo por fari en diversaj forumoj. UEA estas unu el la plej grandaj kaj gravaj forumoj, sed ni devas tiel labori, ke ĉiu forumo siaspece floras, kaj ke ili floras kune. Ni certe sukcesos kun ĉies helpo. Antaŭdankon pro ĉies kunlaboro kaj helpo.

laŭ **Libera Folio**

## El la vivo de studentoj Esperantistoj en la Universitato de „Tria Aĝo” en Nova Sonĉo (Nowy Sącz)

Malgraŭ, ke jam estas ferioj, nia agadkalendaro plu estas plena de diversaj okazintaĵoj. Ne estas semajno sen iu kumveno, aranĝo, partumo en iu programo.

Finiĝis Sandecia Semajno de Korpa kaj Mensa Aktiveco (3–10.06) kaj tuj la 12<sup>an</sup> de junio en la Urba Kultura Centro okazis solena disdono de la atestiloj pri finitaj kursoj (baza, progresiga kaj konversacia) kiel kutime ĉe kafo, kuko kaj glaseto da vino.

La 14<sup>an</sup> de junio estis solenaĵo ferman-ta la duan lernojaron de studentoj en SUTW. Honorigis ĝin Rektoro de WSB – NLU dr Krzysztof Pawłowski per grandioza prelego

La solenaĵon finis komuna kantado de nia himno „Bela estas Sandecia Tero” kaj foto ĉe „Krokuso”

En dimanĉo la 17<sup>an</sup> de junio ni vizitis la vilaĝon Olśanka (Olszanka). Estas tiu loko proksime al nia urbo, pri kiu scias malmultaj homoj, kaj ĝi povus esti celo por familiaj, aŭ kolegaj dimanĉaj ekskursoj ekster la urbo. En la loko oni sentas ĉeeston de la Kreinto. Religia kanto salutas ĉiun proksimiĝantan al la kapeleto de Maria troviĝanta en granda verda stelo.

La kapeleto estas en malgranda vilaĝo apud Golkovicka Ponto ĉe la rivero Dunajec (Gołkowicki Most). Ĝi estis konstruita kaj estas protektata de pastro Jozefo Zielonka, Landa Animzorganto de Esperantistoj. Tie troviĝas la hejmo de la pastro, kiu invitis delegataron de Esperantistoj el Nova Sonĉo (Nowy Sącz) al sankta meso en la lingvo Esperanto.

Dudek personoj en kvar aŭtoj estis

veturantaj por partumi en la meso celebrata en „La plej Malgranda Baziliko”, kiel ŝerce nomas la kapeleton en sia hejmo pastro Jozefo Zielonka. Tial, ĉar en la ĉambreto krom la altaro kaj la pastro sufiĉas loko nur por kelkaj personoj, aliaj staris en koridoro kaj en apuda ĉambro.

Antaŭ la meso ni ricevis liturgiajn libretojn en Esperanto, kun indikoj, kiujn partojn vice per kiuj estos legataj kaj kantataj.

Tiel en la Dia eta ejo lumigata blue per sunradioj tra irantaj tra kolora vitralo, kiu prezentas Dipatrinon kun Infaneto ni spertis kortuŝe la sanktan meson celebratan de nia „Animzorganto”.

Poste ni estis regalataj per pladoj preparitaj de la pastra fratino. La pladoj estis tiom abundaj, ke ne estis ebleco manĝi ĉiujn frandaĵojn. Oni timigis nin, ke la restaĵoj putriĝos, se ne estos ĉio manĝita, sed ni klarigis, ke ne volas peki kontraŭ la kvina principa peko pro manĝego.

En simpatia etoso, jam amikiĝantaj (kio la plej facila estas ĉe manĝotablo) kun aliaj ĉeestantoj el Tarnovo (Tarnów) kaj Mielec, ni estis irantaj al arbara rando ĝis la kapeleto. Tie ni ankaŭ ricevis Esperantajn religiajn kantaretojn kaj en la arbara verdejo ĉe la bildo de Dipatrino kaj mirakla bildo de Kristo donanta forton al ĉagrenitoj kaj malsanuloj — ni kantis sincere kaj entuziasme.

Dio estis ĉirkaŭ ni. Ni sentis tion en la suno lumanta tra foliaro, en kantado de birdoj super la kapeleto, en la bona rigardo kaj rideto de nia Anima Zorganto.

Ni revenis silentigitaj, purigitaj, plenigitaj per pozitiva energio kaj feliĉaj.

Pro tiuj belaj travivaĵoj — estu danko al Dio kaj al la pastro Jozefo Zielonka

Halina Komar

## La 29<sup>a</sup> ĈEP–arangĝo en Mielno lasis post si nur belajn rememorojn

En la tagoj 12–20 de junio 2007 okazis en Mielno la 29<sup>a</sup> Ĉebalta Esperantista Printempo kun riĉa kaj varia ĈEP–programo. Tiu ĉi internacia E–arangĝo estis partoprenita de preskaŭ 80 gesamideanoj el 12 eŭropaj landoj. La honorprotektecon super la arangĝo plenumis denove d-ro Mirosław Mikietyński — prezidento de Koszalin kaj mag. Zbigniew Choiński — komunumestro de Mielno. La ĉefa celo de la arangĝo estis praktika utiligado de la lingvo internacia Esperanto.

Pri internacia karaktero de la arangĝo atestis naciaj flagoj de ĉiuj landoj, el kiuj venis gesamideanoj. Ekspoziciitaj ekstere ili gaje flirtis en la vento kaj kune kun Esperantaj flagoj ornamis blankajn panelojn, sur kiuj videblis verdokoloraj surskriboj: **Ĉebalta Esperantista Printempo kaj Eŭropa Unio bezonas la lingvon Esperanto.**

Impresplena estis la solena inaŭguro de la arangĝo, partoprenita ankaŭ de koŝalinaj gesamideanoj kaj de honoraj gastoj, inter kiuj troviĝis Stanisław Mandrak — prezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA, Zbigniew Choiński — komunumestro kaj Henryk Stakuć — direktoro de la gastama ripozcentro, en kiu jam la 15<sup>an</sup> fojon okazis la arangĝo.

En bele dekoraciita kunvenejo ĉiujn kunvenintojn varmege bonvenigis Czesław Baranowski, ĉeforganizanto de la arangĝoj ekde 1991 jaro kaj samtempe prezidanto de PEA–Filio en Koszalin. En la inaŭgura parolado li esprimis sian grandan ĝojon pro la renkontiĝo kun multnombra grupo da eŭropaj Esperantistoj, inter kiuj troviĝis 27 gesamideanoj,

kiuj unuafoje partoprenis la arangĝon. Al multnombra grupo da kunvenintoj estis fluantaj liaj afablaj vortoj kaj bondeziroj. Dum la solenaĵo belegan diplomon ricevis Urszula Giercarz pro la aktiva kontribuo al ĈEP–programo dum la lastaj 10 jaroj. Fine de la solena inaŭguro sekvis salutvortoj de la landaj reprezentantoj kaj de Zbigniew Choiński, kiu esprimis sian grandan ĝojon kaj kontenton pro la organizado de ĈEP–arangĝo en Mielno.

Poste sekvis distra parto de la solenaĵo preparita de Urszula Giercarz kune kun multnombra grupo da kantemuloj. Post abunda vespermanĝo sekvis tradicia interkonatiĝa vespero ĉe akompano de bona muziko. Gaja dancado kaj kantado daŭris ĝis noktomezo.

La sekvontan tagon komenciĝis realigado de alloga ĈEP–programo, en kiu troviĝis i.a. interesaj prelegoj, rakontoj, belaj videofilmoj, ĉiutaga lingvoperfektigado en 3 grupoj, ĉiumatena Yumeiĥo–terapio, gvidata de Barbara Poterucha el Belgio kaj lernado de E–kantoj ĉe akordiona akompano, fare de Urszula Giercarz. Ege plaĉis al komencantoj instruado de Esperanto laŭ „Rekta Metodo”, kiun sukcesplene prezentis en praktiko Stanisław Mandrak.

Tre interesaj estis ankaŭ la prelegoj: „Lingvaj problemoj en Eŭropa Unio” kaj „Oni devas taksi la sanon ne nur en mal sano”. La unuan prelegon preparis Stanisław Mandrak kaj la duan prelegon Czesław Baranowski kaj Stanisław Mandrak. Vastan informon pri la 91<sup>a</sup> UK de Esperanto en Florenco preparis Gunter Ebert kaj koncizan raporton pri pasintjara solenaĵo okaze de 35-jariĝo de amika kunlaborado inter Esperantistoj el du ĝemelaj urboj Neubrandenburg kaj Ko-

szalin transdonis Werner Pfennig. Post ambaŭ informoj sekvis prezentado de belaj fotoj sur granda blanka ekrano. Multaj partoprenintoj de la 29<sup>a</sup> ĈEP kun vera intereso rigardis la fotojn rememorigantajn la 28<sup>an</sup> ĈEP kaj belajn fotojn montrantajn de supre la verdan urbon Koszalin. Ege impresis ĉiujn la prelego: „Fabeloj kaj legendoj en la klasika muziko”, preparita de Günter Ebert. Impresplena estis ankaŭ la prelego ilustrita per belaj fotoj: „Abeloj kaj abelbredado en diversaj landoj”. Post la prelego Rosa Ebel el Germanio afable invitis ĉiujn gustumi la mielon el sia abelejo.

Multe da ĝojo donis al ĉiuj ĈEP-partoprenintoj la vespero de eŭro-humoro kaj la societa loterio ‘Tombolo’, dum kiu ĉiu ricevis unu utilan lotaĵon. Tre atrakciaj estis du ekskursotagoj al Ustronie Morskie, Kołobrzeg kaj al Koszalin, Strzeżęcino. Ekster la programo okazis agrabla promeno tra Jamno-lago sur la ferdeko de la motorboato „Mila”.

Neforgeseblajn impresojn lasis post si ankaŭ adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun kolbasetrostado, biertrinkado kaj gaja kantado.

La lastan tagon post la matenmanĝo okazis tradicia sumigo de la aranĝo dum kiu ĉiuj esprimis sian kontenton pro la organiza flanko de ĈEP, pro la interesa Esperanta programo kaj pro neripetbla Esperantista etoso. Poste sekvis nur kizado kaj ĝisado antaŭ forveturo hejmen.

Czesław Baranowski

## La 18<sup>a</sup> Ekumena Esperanto-Kongreso finiĝis!

En la tagoj 21–28 de julio 2007 en Pelplino okazis la 18<sup>a</sup> Ekumena Esperanto-Kongreso. Arangis ĝin du kristanaj esperantistaj organizoj: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj unuiganta kristanojn de aliaj eklezioj Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI).

La kunorganizado de la Kongreso estis Koĉevia Esperanto-Filio en Pelplino.

La Kongreson partoprenis 225 diversaj personoj, el 20 landoj! La plej maljuna partoprenanto estis 86 jaraĝa svedo kaj la plej juna — Francisko, kiu antaŭ ne longe iĝis kvarmonata.

La Kongreson ĉeestis ankaŭ kelkaj familioj interesantaj pri Esperanto.

Samtempe okazadis la 8a Ekumena Esperanto-Tendaro, kies partoprenatoj aŭskultis kelkajn prelegojn ligitajn kun la kongresa temo, inter aliaj titolitan: „La Dio estas amo” kaj partoprenis la diskutforumon kaj multajn seminariojn.

La Kongreso estis bona okazo por promocii la Koĉevio-regionon kaj la tutan Pomerion.

Kadre de la programo preparita de Loka Kongresa Komitato partoprenantoj ĉiutage spektis la artan programon pre-



zentitan de pelplinaj lernantoj kaj ĉeestis ekskursojn al Gdansko kaj Malborko.

Dum la semajna restado en Pelplino kongresanoj ligis multajn novajn kontaktojn kaj faris korajn konatecojn.

Esperantistoj lasis la kongresan urbon tre kontentaj kun forta decido reveni de nove ĉi tien.

Jam baldaŭ aperos la plena raporto...

Nune, nome de organizantoj, mi kore dankas al ĉiuj personoj kaj institucioj pro la helpo en organizado de la Kongreso, precipe al la promocio programo.

Jadwiga Wasiuk

Prezidantino de LKK de EEK

## IKUE

La balotoj en Pelplin rezultigis jenon: Entute estis ricevataj 277 validaj balotoj (247 perleteraj + 30 rektaj balotoj).

Kandidatoj:

1. Miloslav Švaček 249 voĉdonojn, (do, superinte la 50% plus unu da ricevataj voĉoj, li estas reelektita prezidanto)
2. Carlo Sarandrea 228,
3. Sac. Gabriel Anda 210,
4. D-ro Antonio De Salvo 199,
5. Marija Belošević 195,
6. Bruno Masala 188,
7. Sac. Attila Szép 172,
8. Sac. Lajos Kóbor 163,
9. Stanisław Śmigielski 142,
10. Sac. Stefano Hawkes-teeple 139,
11. Pavol Petrík 122,
12. Sac. Duilio Magnani 121,
13. D-ro Giovanni Daminelli 119.

Estis do elektitaj: Prezidanto M. Švaček. Estraranoj: C. Sarandrea, sac. G. Anda, De Salvo, M. Belošević, B. Masala, sac. A. Szép, Sac. L. Kóbor, S. Śmigielski.

Kontrevizoroj estis elektitaj: G. Daminelli kaj P. Petrík.

La nova estraro kiel vicprezidantojn elektis: M. Belošević kaj sac. A. Szép.

## Malborko

**En Parko de la Mondo en Malborko oni malkovris obeliskon donacitan de loĝantoj de la usona urbo Seattle. Ĝi estas jam 35<sup>a</sup> objekto ligita kun Esperanto en la urbo situata ĉe la Nogat-rivero.**

Neniam pli frue dum la solenaĵo en la malborka „Parko de la Mondo” estis 240 esperantistoj el 20 landoj. Venis 5 aŭtobusoj kun partoprenantoj de la 18<sup>a</sup> Ekumena Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Pelplino en la tagoj 21–29<sup>a</sup> de julio sub protekto de: Ministro Pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo — Kazimierz Ujazdowski, Marŝalo de Pomeria Vojevodio — Jan Kozłowski, Episkopo, Prezidanto de La Konsilantaro de Pola Konferenco pri Ekumenismo — Tadeusz Pikus kaj urbestro de urbo Pelplino — Andrzej Stanuch.

La 24<sup>an</sup> de julio la obeliskon malkovris profesoro Jerzy Dobrzyński — Honora Civitano de Usono kune kun ĉeĥo Miloslav Švaček — Prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj franco Philippe Cousson — Prezidanto de Kristana Esperantista Ligo Internacia.

La solenaĵon, malgraŭ pluvo, partoprenis reprezentantoj de la Malborka Urboficejo — Vicurbestro Dariusz Denis kaj vicprezidanto de la Urba Konsilantaro — Tadeusz Woźny.

Indas substreki, ke inter gastoj estis du malproksimaj familianoj de la nuna Papo Jozefo Ratzinger, nome Lia kuzino Barbara Ratzinger kun sia nepo Domini-

ko Ratzinger (la studento de la unua studjaro en la porpastra seminario) el Villingen-Schwenningen (Germanio) — ili ambaŭ estas esperantistoj.

Sur la obelisko troviĝas surskribo: „Paco regu sur la Tero” en la lingvoj: pola, Esperanto, angla, franca, germana kaj rusa. Aldone sur la latuna tabulo troviĝas dediĉo de la usonurbaj loĝantoj, por ke en Malborko kaj en Pollando regu paco.

Post la solenaĵo, jam en la plensuno, la gastoj vizitis la Kastelan Muzeon kaj plenaj de impresoj forveturis al Pelplino por daŭrigi debatojn dum la Ekumena Kongreso.

## **Polaj kaj germanaj infanoj dum du semajnoj en Herzberg**

### **Ĉu naskiĝis la dua Infana Kongreseto?**

Jam la duan fojon ripetiĝis la dulanda Somera Arbara Lernejo (Salo), kiu ĉiujare kunigas dum duona monato Esperantolernantajn infanojn inter 12 kaj 16 jaroj el la ĝemelurboj Góra (Pollando) kaj Herzberg — la Esperanto-urbo (Germanio). Dum la kunrestado de la 28<sup>a</sup> de julio ĝis la 11<sup>a</sup> de aŭgusto ili interrilatis en la internacia lingvo en amika internacia etoso sub la gvido de geinstruistoj.

En siaj artikoloj la gazetaro emfazis, ke la ĉijara aranĝo karakteriziĝis per elstare riĉa programo prizorgita de la loka esperanta Interkultura Centro. Fakte, la infanoj estis dorlotitaj: ili amuziĝis en glitejo kaj naĝejo, lernis arkopafi, dancis diverslandajn popoldancojn, vizitis bestoparkon, esploris groton, ekskursis al turismaj lokoj, publike koncertis en Esperanto kaj migradis en arbaro. Ne mankis, kompreneble, instrua parto, konsistan-

ta el praktikado de la lingvo kaj fina ekzameno. La partopreno en la renkontiĝo estis senpaga, ĉar ĉiuj kostoj estis kovritaj de la du urboj, la Pol-Germana Junulara Fondaĵo kaj privataj sponsoroj.

Tre impresa estis la favoro de la urbestro, Gerhard Walter, kiu oficiale akceptis kaj regalis la gepartoprenantojn en la urbodomo, persone gvidis tablotenisan turneon (kaj eĉ ludis en ĝi kun la infanoj), disdonis pokalojn kaj donacojn, prezidis diversajn publikajn aranĝojn kaj plurfoje vizitis la kunvenojn.

Esperanto-instruado, biblioteko, muzeo je via servo:

Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Tel: +49/(0)5521-5983  
[www.herzberg.de](http://www.herzberg.de), <http://ic-herzberg.de>

Ĉu oni eĉ kreos Esperanto-regionon?

Nekredeble, sed vera informo: Je la 27<sup>a</sup> de julio 2007 Peter Zilvar (GEA-filio), Marika Frense (EGS) kaj Zsofia Korody (AGEI) partoprenis projektfoiron en la najbara urbo Osterode. I.a. pro la unika agnosko: Herzberg — la Esperanto-urbo, GEA-filio por kulturo kaj klerigado en Herzberg, oficialaj kontaktoj per Esperanto al nia pola ĝemelurbo, ktp. la bonŝancoj por „modela Esperanto-regiono” vere realas, eble jam en 2008 ni povos ricevi subtenojn.

Cetere estis vere longa kaj kontinua preparvojo. Ministro Ehlen el Hanovro, deputino s-ino Seeringer (baldaŭ ŝi vizitos nian Germanan Esperanto-Centron en Herzberg), subdistriktestro Bernd Reuter) donas verdan lumon por la plua



multfaceta progreso de Esperanto en la reala vivanta medio.

Esperanto havos prioritaton, ĉar ni estas en la plej alta poentkategorio.

Por la gimnazio en Herzberg ni jam peris sukcesajn kontaktojn al gimnazio en Budapeŝto, al nia ĝemelurbo en Górra kaj nun pro klasvizitoj ankaŭ al gimnazio en Nov-Brunsvigo en Kanado (dank al samideano Kodjo), kiu vizitis s-ron Böthel, la estron de la gimnazio en Herzberg. La gedirektoroj vere ĝojis kaj laŭdas Esperanton, nun ili/ni serĉas kontaktojn al gimnazio en Italio.

P.S. Kiam vi vizitos vian Esperanto-urbon?

## Novtipaj Esperanto-ekzamenoj preparataj

Konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la Konsilio de Eŭropo la ekzamena laborgrupo de UEA kaj ILEI estas ellaboranta novan ekzamensistemon, kiu ebligas al la esperantistaro trapasi internaciajn ekzamenojn je tri niveloj A, B kaj C. La novtipajn atestojn pri lingvokono pli kaj pli ofte jam postulas dungantoj kaj edukinstitutoj ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en multaj aliaj landoj de la mondo. La ekuzo de unueca normaro ankaŭ en Esperanto-ekzamenoj ebligas taksu lingvajn lertojn laŭ samaj kriterioj en kaj ekster Esperantujo, kompare kun ajna nacia lingvo. (Pli da informoj troviĝas en la sekcio Referenckadro en [www.edukado.net](http://www.edukado.net)).

La testado de la novtipaj ekzamenoj finiĝos en tiu ĉi jaro kaj la nova ekzamensistemo povos ekfunkcii en 2008. En la unua periodo tiaj ekzamenoj estos organizataj de du eŭropaj centroj, kiuj poste trejnos kaj rajtigos ekzamenantojn kaj organizos ekzamensesiojn ankaŭ aliloke. La malnovaj ekzamenoj de UEA-ILEI dume plu es-

tos okazigataj laŭ la malnova strukturo, t.e. en du niveloj. Estas konsilinde trapasi ilin, kiam oni bezonas atestilon por propra celo aŭ nur ene de la movado.

Pri la Referenckadro, taksaj normoj kaj la novtipaj ekzamenoj okazos prezentoj dum la Tago de Lernejo en la UK en Jokohamo. UEA kaj ILEI alvokas siajn landajn asociojn kaj sekciojn akiri kaj studi la broŝuron „La Komuna Eŭropa Referenckadro”, eldonita de UEA ĉi-jare, kaj laŭ ĝi komenci adapti siajn enlandajn instru- kaj ekzamensistemojn. Oni povas mendi la broŝuron ĉe la Libroservo de UEA aŭ elŝuti de [edukado.net](http://edukado.net).

Por pliaj informoj kaj klarigoj oni kontaktu la vicprezidanton de ILEI, Zsafia Korody, [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

## Instruista kursaro en Poznano (Pollando) en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI

La Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI kune organizas internacian instruistan kursaron, kiu disponigos la bazajn konojn necesajn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka semajna sesio (la unua okazos 15–21.09.2007 kaj la dua 2–8.02.2008), intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kaj fina ekzameno okazos en septembro 2008. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista kursaro.

(Tiuj kiuj partoprenos la kursaron en kadre de siaj trijaraj interlingvistikaj studoj, kiel specialigo, ricevos diplomon

pri postdiplomaj interlingvistikaj studoj).

Kondiĉo: bona lingvoscio (atestilo pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de Esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 360 EUR, B-landoj 125 EUR por unu semestro.

### **El la Programo:**

Lingvopedagogio (Zsófia Kóródy, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Maria Majerczak):

Bazaj faktoroj de lingvopedagogio

Esperanta metodiko

Instruhelpiloj (de instruista kofro ĝis retkursoj)

Esperanta kulturo (István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny):

Plej gravaj eventoj de historio de Esperanto:

Ĉefaj periodoj de E-literaturo

Tiklaj punktoj de E-gramatiko

Lingva trejnado (per testoj)

Kiel donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj:

Problemojn de la nuntempa E-movado (Humphrey Tonkin)

Nuntempa literaturo (István Ertl)

Psikologiaj aspektoj de komunikado (Claude Piron)

Interkultura komunikado (Ilona Koutny)

Aliĝo ĉe: [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)

d-rino Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz, Al. Niepodległości 4, PL 61-874 Poznań, [www.staff.amu.edu.pl/~inter/index.html](http://www.staff.amu.edu.pl/~inter/index.html)

### **Novaĵoj de la Pola Sekcio de ILEI**

La prezidantino kaj fondintino de la nuna pola ILEI-sekcio, Maria Majerczak, rezignis pri la funkcio post pli ol 10-jara gvidado de la sekcio. Ŝi ankaŭ ne plu rolas kiel pola peranto de la revuoj *Juna Amiko* kaj *Scienca Revuo* — tiun funkcion transprenis Magdalena Tatara. Maria Majerczak iĝis konsultanto de ILEI-Pollando. Ŝi restas komitatano de ILEI kaj membro de la Scienca Komitato de *Internacia Pedagogia Revuo*.

Kiel filologo (latinidaj lingvoj kun la franca kiel ĉeflingvo), universitata instruistino kaj trejnistino de instruistoj de fremdaj lingvoj, instruistino de Eo en Jagelona Universitato, instruistino en la E-fako de la Universitato de Poznań, en ILEI ŝi daŭre okupiĝos pri gvidado de E-kursoj kaj trejnado de E-instruistoj. Ŝi redaktos la novan hejmpaĝaron de kelkaj E-organizoj de la juna generacio en Krakovo. Ŝi plugvidas la Novaĵservon de Pola Sekcio de ILEI atendante ke iu ĵurnalisme kompetenta persono transprenu la taskon.

Ekster ILEI, ŝi restas direktorino de la Esperanta institucio — Internacia Centro de la Kulturoj en Krakovo, disvolvantino de la studenta E-movado en superaj lernejoj de la urbo, gvidantino de la Fanklubo de la Esperanta Muziko en Krakovo, kunordigantino de la laboro de la Rondo de Junaj Ĵurnalistoj-Esperantistoj, gvidantino de la (nun paŭzantaj) E-kabaredo kaj teatro. Ŝi esperas... fine trovi tempon por siaj ŝatataj profesia lingvistiko kaj kantado, muzik-komponado, danc-okupoj.

### **La Estraro**

La nova prezidanto de la sekcio estas Piotr Nosek, la ĝisnuna sekretario.

**Piotr Nosek** (Petro) estas duobla filologo, fakulo pri la turka kaj persa lingvoj, literaturoj, kulturoj. Li studis en Jagelona Universitato. Li flue parolas plurajn orientajn kaj okcidenteŭropajn lingvojn. „Ĉu vi parolas ĉine...?” :-) Ĉiukaze, li parolas kaj li studis dum unu jaro en la Universitato de Fremdlingvoj de Ŝanhajo. Li studis ankaŭ en sciencaj institutoj de Torino, Istanbul, Ankar, Tehrano. Principe, li loĝas en Krakovo. Li estas tradukisto, ĉiĉerono, instruisto. Pri la mondo li scias sufiĉe multe. Li ĉiĉeronas, plej ofte en Ĉinio kaj Italio, foje en la mondfama antikva salminejo de sia naskiĝurbo Wieliczka. Pri vulkanoj li scias preskaŭ ĉion ;). Li gvidas turistojn sur Etnon, Strombolon... Adreso: [piotr.esp@gmail.com](mailto:piotr.esp@gmail.com)

**Magdalena Tatara** estas filologo, instruistino de la franca kaj pola kiel fremdlingvo (pri tiu lasta ŝi studis postdiplome), instruanta en la universitato kaj en lernejoj. Ŝi instruas la polan lingvon al homoj el diversaj landoj... ĉiam loĝante apud Krakovo! Ŝi naskiĝis apud Wieliczka kaj, kiel Piotr, ŝi foje vizitigas al turistoj la vidindaĵojn de la mondunika salminejo. Plurjara kasistino de la sekcio, sperta kaj kompetenta aktivulino, Madzia nun estas kungvidantino de ILEI-Pollando, speciale dum forestado de Piotr. Ŝi estas la KONTAKT-PERSONO de la organizo. Adreso: [mtatara@gmail.com](mailto:mtatara@gmail.com). Adreso de ILEI-Pollando: [ILEI-PL@esperanto-reto.org](mailto:ILEI-PL@esperanto-reto.org)

**Małgorzata Komarnicka** (Margareta), nova, agema esperantistino, estas nova estraranino de ILEI-Pollando. Ŝi loĝas en Lubin, en Malsupra Silezio. Ŝi ŝategas studi en kaj per Esperanto! Ŝi bakalaŭriĝis en la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino, ŝi studas ankaŭ en la Esperanto-fako de la Adam Mickie-

wicz-Universitato en Poznań. Se al tio aldoniĝos „tre supera” kurso de Esperanto en Jagelona Universitato okazonta ekde oktobro, ŝi havos ankaŭ Esperantan „Certifikaton” de tiu universitato. En la asocio ŝi okupiĝos pri la retpaĝaro (pri ties teknikaj aspektoj) kaj pri la statistiko. Adreso: [mjk.eo.pl@gmail.com](mailto:mjk.eo.pl@gmail.com)

Ĉi-aldone: foto pri la estraranoj kaj la direktoro de la C.O. de UEA, Osmo Buller, dum ties vizito en Krakovo, 27 feb. 2007. De maldekstre: Osmo Buller, Maria Majerczak, Małgorzata Komarnicka, Magdalena Tatara, Piotr Nosek. Fotinto: Adam Wilkus.



PLIAJ KUNLABORANTOJ ESTAS SERĈATAJ. NI INVITAS AL KUNLABORO MALNOVAJN KAJ NOVAJN ESPERANTISTOJN!

Klarigo: La tutlanda asocio havas novan oficialan nomon: Międzynarodowy Związek Nauczycieli-Esperantystów ILEI-Polska; Esperante: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI-Pollando. La asocio estas samtempe pola sekcio de ILEI internaciskala.

## Mia Vojaĝo en Esperanto-lando

Boris Kolker: *Vojaĝo en Esperanto-lando: Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo*. Tria eldono reviziita, kun indekso de nomoj, riĉe ilustrita. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2005. 280 paĝoj. ISBN 92 9017 088 3. Prezo: 18 eŭroj + afranko.

Kiel nova esperantisto, oni studas la lingvon, memorfiksas vortojn, sufiksojn, korelativojn, batalas kun akuzativo kaj provas konstrui kompreneblajn frazojn.

Baldaŭ aperas nocioj kiel Zamenhof, movado, agado, UEA, kongresoj, internaciaj ekzamenoj, orginala literaturo, interna ideo. Aperas novaj nomoj, kiuj ŝajnas tre konataj por aliaj personoj, sed ofte malfacile troveblaj en naciaj enciklopedioj: Piron, Privat, Valano, Eroŝenko, Auld, Corsetti, Lapenna...

Post iom da tempo aperas scivolemo, bezono legi ion pli bonan, veran literaturon — ne nur lernolibrojn, kaj diskuti pri ĝi; legi bonan poezion kaj kompreni ĝiajn sencon kaj profundon; kaj fine — bezono lerni verkadon de bonaj eseoj, artikoloj, rakontoj. Sed kie estas tiu instruisto, kie estas tiu lernejo, kie estas lernolibroj por lerni ĉion ĉi?

Ĉio ekzistas! La lernejo estas Internacia Perfektiga Koresponda Kurso en Interreto, la instruisto — akademiano Boris Kolker, kaj lernolibro — la tria eldono de la plej aĉetata libro „Vojaĝo en Esperanto-lando”. La libro ne estas dika, nur 280-paĝa. Sed kiom da informoj, kiom da ekzercoj, kiom da legado, kiom da verkado! Nur 26 lecionoj, ne pli, sed bezonata estis por mi pli ol unu jaro por tralegi kaj trastudi ilin.

La libro enhavas informojn pri la vivo de Zamenhof, biografiojn de konataj esperantistoj kaj verkistoj, kaj elsta-

raj movadanoj. Do tiuj personoj iom post iom proksimiĝas al ni, al nia konscio. Tiuj famaj gravuloj, kies diversspeca agado estas rimarkinda kaj memorinda, fariĝas niaj amikoj.

En la libro troviĝas bonega elekto de literaturo — noveloj kaj poeziaĵoj, fragmentoj de romanoj. Eĉ la personoj, kiuj neniam legas poezion, fariĝas ĝiaj ŝatantoj. Ĉiu teksto estas kiel perlo.

Ĉiu ĉapitro enhavas komentaron kun klarigo de malfacilaj vortoj, mallongaj biografioj kaj aliaj koncizaj kaj gravaj informoj. Ĉiu leciono finiĝas per Lingva praktiko kun ekzercoj de krea karaktero: interpretado de tekstoj, eseoj por verkado, vortludoj kaj kvizoj pri Esperantaj temoj.

Sed la plej grava kaj valora estas la gvido. Sen la instruisto tiu libro estus nur duone bona. Humoro, pacienco, toleremo kaj helpemaj rimarkoj de Boris estas necesaj por evoluo de lernantoj. Dankon, Boris, por via admirinda libro kaj la tuta kurso. Kvankam mi estis komencanto, mi faris tiun vojaĝon en Esperanto-lando sufiĉe rapide kaj eĉ sukcesis trapasi internacian ekzamenon dum la 91<sup>a</sup> Universala Kongreso en Florenco. Mi esperas, ke pli da esperantistoj ekdeziros fari kun vi tiun mirindan vojaĝon.

Urszula Kwaśniewska

Urszula Kwaśniewska (polino, nun loĝanta en Svedio) antaŭ nelonge sukcese finis sub mia gvido Internacian Perfektigan Korespondan Kurson per mia libro „Vojaĝo en Esperanto-lando” (ĵus anoncita kiel la plej vendita Esperanta libro por la kvina sinsekvaj jaro): [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vojaĝo\\_en\\_Esperanto-lando](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vojaĝo_en_Esperanto-lando)

Ŝi verkis recenzon pri „Vojaĝo”. Laŭ konsilo de Osmo Buller, mi rekomendas tiun recenzon por publikigo en *Pola Esperantisto*. Per tio ni plikonigos tiun popularan libron en Pollando. (Boris Kolker)

## 10<sup>a</sup> Internacia Fotokonkurso

Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de „La Ondo de Esperanto” invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso.

En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

**La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU–236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1<sup>a</sup> de decembro 2007.**

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

**Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:**

(1) 50 eŭroj kaj abono de „La Ondo de Esperanto” en 2008, (2) 25 eŭroj kaj abono de „La Ondo de Esperanto” en 2008, (3) abono de „La Ondo de Esperanto” en 2008. Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de „La Ondo de Esperanto”) por la plej bona foto pri la temo Festoj.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en „La Ondo de

Esperanto”. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31<sup>a</sup> de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo–rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Halina Gorecka, sekretario

Legu pli pri niaj Fotokonkursoj

[www.esperanto.org/Ondo/Ind-fk.htm](http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-fk.htm)

## Preĝo de optimisto

Dio, mi dankas pro:  
malordo, kiun mi devas purigi post gastoj,  
ĉar tio signifas, ke mi havas amikojn;  
impostoj, kiujn mi devas pagi, ĉar tio signifas, ke mi estas laboranta;  
herbo, kiun mi devas falĉi, fenestroj, kiujn necese oni devas purigi, pluvotuboj, kiujn oni devas ripari, ĉar tio signifas, ke mi havas domon;  
vestoj, kiuj estas iom malvastaj, ĉar tio signifas, ke mi havas manĝaĵojn;  
ombro, kiu protektas min, kiam mi laboras, ĉar tio signifas, ke mi estas en la sunlumoj;  
konstanta plendo al registaro, kio signifas, ke mi havas liberecon de vorto;  
granda fakturo pro varmigado, ĉar tio signifas, ke estas varme al mi;  
virino, kiu sidas ĉe mi en preĝejo kaj nervozigas min per sia kantado, ĉar tio signifas, ke mi aŭdas;  
amaso da aĵoj por lavado kaj gladado, ĉar tio signifas, ke miaj amatoj estas ĉe mi;  
vekhoroĝo, kiu sonoras frumatene, ĉar tio signifas, ke mi vivas;  
lacigo kaj muskola doloro vespere, ĉar tio signifas, ke mi estis aktiva dum la tago.

El **Apostol.pl** tradukis

Cecylia Wójcik

## Estimata Sinjoro!

Mi petas pardonon pro la lingvaj eraroj en mia letero. Tion kaŭzas preskaŭ 20-jara paŭzo en la E-skribado. Neatendite lasta numero de *Pola Esperantisto* instigis min skribi subajn rimarkojn.

Unue mi kore gratualas al Vi la eldonadon de la revuo. Tio estas tre konkreta kaj grava kontribuado en E-movado. Via laboro kaj verko estas kiel oazo sur la dezerto. Kaj ni bone scias kiel gravaj estas oazoj por vojaĝantoj.

Mi varme subtenas Vian decidon pri eldonado de la nova revuo por esperantistoj. Laŭ mia scio PEA preskaŭ ne funkcias. La interreta paĝo de PEA havigas nenium informon pri tio.

Ĉu valoras diskuti kun fantomoj? Do ne perdu plu da tempo por skribi artikolojn similaj al artikolo „Politikumi...”

Tamen la demado pri karaktero kaj enhavo de la estonta revuo estas fundamenta. Bedaŭrinde mi tiel longe estis ekster la E-movado, ke nun mi povas nenion interese proponi. Via eldonejo povus esti finance sendependa do Via revuo devas kontentigi precize difinitajn legantojn. Tamen difini estontajn legantojn kaj por ili trovi ĝustajn redaktorojn povas esti en nia pola E-movado nerealigebla. Do eble ŝanĝu nenion, tamen daŭrigu plu la eldonadon!

Kio kontentigus min? Jen mia opinio.

En via artikolo „Politikumi...” Vi skribis inter alie, ke „Esperantujo bezonas ĉiujn fortojn... kies celo estas i.a. reakiri perditan dum la pasintaj jaroj prestiĝon...”. La uzata „lingvo” devenas el la periodo de unuaj esperantistoj. La vortoj estas pravaj kaj intencoj tre noblaj. Tamen en nuntempa mondo ĉi tiuj vortoj signifas nenion. Kaj miaopinie ne nur pola sed ankaŭ la monda E-movado forte dormas kaj iom post iom

malgrandiĝas (aŭ simple: pereas).

De tempo al tempo esperantistoj sonĝas kaj rakontas unu al la aliaj la sonĝojn. Se ili rakontas la Esperantajn sonĝojn al neesperantistoj, tuj fariĝas ridindaj kaj vekas kompton.

Do Via revuo povus esti LA SNORILO (aŭ SONORIGO) kiu almenaŭ provus vekigi la dormantan eperantistaron kaj por aliaj klarigus la lingvan maljustecon de nuntempa mondo.

Fine mi deziras al Vi pluan disvolvon de Via edonejo HEJME kaj sukcesan eldonadon de la nova pola esperantista revuo.

Kun sinceraĵ salutoj

Ryszard Doliński, Rzeszówi

En la dua numero de *Pola Esperantisto* plaĉis al mi eksterordinare la artikolo „Portreto de la virino”, do mi elkore dankas pro ĝi al la aŭtorino, s-ino Irena Szanser, kaj al la redaktoro.

Salutas kore

Aurelia Sokół

*Ĉar en Pola Esperantisto aperis politika paskvilo sub ofenda titolo „Paranoja Pollando” mi rezignas pri plua abono. Samtempe, kun bedaŭro mi informas, ke la varsovia Filio de PEA probable ankaŭ ne abonos la revuon, kiu ne garantias politikan neŭtralecon.*

Lech Piotrowski

[red] Kara Sinjoro! Menciita de Vi artikolo, kiel grava estis de ni citita, por ke polaj esperantistoj sciu, kion publikigas aliaj, eksterlandaj medioj, precipe Esperantaj. Do, estas ankaŭ por Vi la ebleco reagi per kontraŭa artikolo, reagi — ne ofendiĝi.

Marĝene: ĉu Vi ankaŭ intencas forĵeti vian televidilon kaj radioaparaton?